**91**
(109)


JANUARO / FEBRUARO 1991

ISSN 0150-5823

**Dumonata kultura informilo kaj esprimilo**
Redaktejo: Esperanto, Cargue Sac, F-47470 BEAUVILLE
Unu n-ro: 10 FF. Unujara abono: 60 FF ĝirotaj al:
**CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS, pĉk 3371 74 M Bordeaux**
(menciu same sur bankĉekoj!) Nia tel.: 53 95 40 26

******************************************************

# TAGMEZA MEDITO PRI NAJBAROJ
## kaj pri amo al homaro



*Al Garolo*

*Jam la trian jaron mi vivas en ĉarma urbeto en suda Anglio. La domo, en kiu mi loĝas, estas kuriozaĵo de l'moderna arkitekturo : sesangula, deksepetaĝa, plena de kolombaj nestoj sur longaj balkonoj ĉirkaŭe. L'unusola tiaspeca domego en la tuta urbeto (ĉu la tuta suda Anglio?). Mi do havas multajn najbarojn. Bedaŭrinde mi ilin ne konas. Plimulton mi eĉ neniam vidis. Ĉu kulpas pri tio dulifta sistemo? Mi loĝas en la dekkvina etaĝo, tial mi kutime promenas sorensuben kun homoj (kaj hundoj) el neparaj etaĝoj. Nur kiam nia lifto paneas, mi vidas aliajn vizaĝojn (kaj aliajn hundojn). Tamen plimulto da loĝantoj restas por mi enigmo. Ĉu ni havas iajn rilatproblemojn? Ho, tute ne! Mi perfekte amas miajn nekonatajn najbarojn. Kun najbaroj* ***pli proksimaj,*** *ĉefe tiuj el mia etaĝo, supra kaj suba, rilatoj pli komplikas. Ĉar ni najbaras - ni do komunikas. La najbaro dekstre estas dik-*

*eta solulo-emerito, kiu ĝentile salutas min kaj mi lin kaj ni interŝanĝas rimarkojn pri la plej angla temo : vetero. Li posedas televidilon kaj kutime rigardas ĝin almenaŭ tago-duonon. Kiam pordo al mia (pli ĝuste nia - ĉar komuna, eĉ pli ĝuste - kolomba) balkono estas malfermita, mi aŭdas bruon : pafojn, kriojn, plorojn, ridojn ktp. Mi laboras kiel tradukisto (do BEZONAS silenton) kaj krome mi ŝatas silenton... sed kion fari? "Amu vian proksimulon..." Ankaŭ mi ne estas senpeka. Kiam mi faras paŭzon kaj komencas kapti lastajn novaĵojn per radio, aŭdiĝas krakoj-grakoj, terura bruo kaj poste paroloj en lingvoj, nekomprenataj por mia najbaro. Li certe aŭdas, ĉu miras, ĉu koleras? - komentojn mi (dume!) ne aŭdis. Sed multe pli brua estas* ***najbaro de supre.*** *Li estas juna energia fraŭlo kaj ŝatas laŭtan muzikon. Efektive, ĝin li ĝuas ĉefe dum sabataj noktoj - kaj tiam mi ekdormas (se ĝenerale ekdormas) sub lulkantoj de liaj supermodernaĵoj.* ***La najbaro maldekstraflanke*** *foje ankaŭ diboĉas. Iun nokton, troviĝinte nuda ekstere (vidinte koŝmaron), kun pordo fermita, li trovis unusolan eblan eliron : frakasi la pordon. Nu ja, sed ankaŭ al mi tio povas okazi. Ĉu mi iru skandali?*

*Ĉu mi skribas ĉion ĉi por plendi pri miaj najbaroj? Ho ne. Mi havas bonajn najbarojn. En diversaj periodoj de mia vivo mi havis diversajn najbarojn. Ĉi tiuj preskaŭ anĝelas. Vi ankaŭ scias iom pri najbaroj. Tamen ni loĝas apude kaj ni devas lerni kunvivi. Eĉ se ni trovas ke AMI najbaron (dum tiu bruaĉo super kapo?!) estas ho kiel malfacile!*

*Kaj kion pri homaro? Vi divenas : la homaro estas iuj nekonataj najbaroj, kiujn ni neniam vidis, eĉ ne konas iliajn nomojn - ami ilin kiom facila.* ***No problem!***

*Kiel ami najbarojn - jen LA problemo. Ĝuste ĉi-momente, dum mi tajpas mian mediton, "mia maljunulo" fritas fiŝojn. Fiodoroj jam tiklas miajn naztruojn... Ho, damnita oldulo. Ĉu ion pli bonan vi ne povis prepari? Rigardu min : ĉi-vespere mi preparos grekan musakon; miksos stufitajn melongenojn kun frititaj kukurbetoj, verdaj kapsikoj, fritos cepojn, ajlon...*

***Oksana***

P.S. Matene, renkontinte la "damnitan maljunulon", mi denove diros "Bonan tagon!" - kaj li reciprokos - eĉ se ni ambaù sukcesos iom fuŝi bonan tagon per niaj fikutimoj. Kunvivi kun najbaroj estas ARTO, kiu postulas ĉiutagajn strečojn. Mi naive pensas ke tio eĉ pli gravas ol amo al abstrakta homaro.

## LA AFERO PRI IRAKO

Ĝis nun mi neniam legis en **Laŭte!** pri la surdiga orkestr-
ado de Televido, radio kaj gazetaro, kiu montras belan unu-
animecon por puŝi al milito kontraŭ Irako, per NIA junularo.
Ni sendis al la eventuala batalkampo la plej multnombran
armeeron, krom kompreneble la USONAN, multe pli ol la
Britoj kiuj laŭtparole apogas, sed multe pli antaŭzorge agas.
Kiel ni glitis partopreni al tiu agado ? Ĝenerale oni diras ke
ni estas aliancanoj de Usono. Estas fakto ke ni subskribis la
aliancan kontrakton NATO (Nord-Atlantika Traktato-Organi-
zo), sed tio tute ne koncernas Saŭdarabion nek persan Gol-
fon. Nome, dum nia alĝeria milito, la Usonanoj agis al ni ne-
amike, kaj per tiuj agoj montris ke ekster NATO ili ne es-
tas niaj aliancanoj. Pli frue, dum nia Vjetnamia milito, ili
same agis, do ni havas nenian moralan reciprokan devon al
ili, ekstere de NATO.
Tion farante, ni agas kontraŭ Irakon, kiu verŝajne ne es-
tas tre demokrata, kvankam tie ekzistas parlamento, sed
kiu kondutis laŭdire sovaĝe kontraŭ sian kurdan genton. Sed
ĝi tamen estas en la Islamana sfero unu el la malmultaj
LAIKAJ ŝtatoj, kun (?) Tunizio kaj Turkio; en Bagdado ek-
zistas kristanaj preĝejoj oficiale vizitataj, kaj pastroj kiuj
ne volas foriri. Al tiu laika ŝtato ni ŝuldas teruran dankon
pro la feroca milito kiun ĝi faris kontraŭ fanatikan Iranon,
kiu endanĝerigis la tutan okcidentan mondon. Tiam ni hel-
pis Irakon, plej forte per armilliveroj... eĉ se nun oni iom
timas tiun superarmadon : tio estis akceptita risko.
Nun ni alflankiĝas kun Sirio, kiu estas ankoraŭ malpli de-
mokrata ol Irako, kaj plie terorisma ŝtato, kies lasta grand-
faro de unu jaro estas la krima eksplodo de nia aviadilo
fluginta el Djamena, kaj kostis al ni plurajn centojn da mort-
intoj, viroj, virinoj kaj infanoj. Krome, samkiel Irako, ĝi
amase murdis devojiĝintojn en Sirio mem. Oni preskaŭ ali-
anciĝis kun Saŭda islama reĝlando, plej religie maltolerema.
Mi tre dezirus legi raportojn de homoj, kiuj tie laboris, send-
itaj far siaj grandaj entreprenoj; mi jam aŭdis antaŭ deko da
jaroj, kaj nove legis raportojn tre instrudonajn en gazetoj.
Kristanismo estas plej malamata tie : fakte, kiam laŭdire
Jesuo diris "Donu al Cezaro tion rilatantan al Cezaro, kaj
al Dio, tion rilatantan al Dio" li antaŭ ĉiuj eltrovis la "LAIK-

ISMON". Tio tute ne ekzistas en Saŭdejo, kie krucetaj juveloj estas severe malpermesitaj, meso kompreneble ankaŭ, kiel ĉiu signo de kristanismo ; mi eĉ legis ke en la armeoj francaj kaj usonaj kiuj ĉi-tieas, oni devigite forigis la ruĝajn krucojn de ambulancaj domoj kaj veturiloj, pro kio ili ne plu estos ŝirmataj. Alia tikla problemo estas la ĉeesto de usonaj soldatinoj en lando, kie la virino vivas karcere en la domo, ne rajtas eliri, nek paroli nek fumi...

Pri Kuvajto denove : tiu reĝolando estis antaŭe iraka, ĝis 1961a, kiam la angloj detranĉis ĝin por sekurigi la anglan petrolregadon (Gulf Oil, ktp) kaj "sendepende" starigis ĝin kun tre riĉa enhavo kaj nemultaj loĝantoj : KUWAIT INCESTMENT OFFICE posedas 300 miliardojn da US-dolaroj en la mondo (i.a. 25% de Hoechst, unu el la tri grandaj germanaj priĥemiaj firmaoj) sed laborigas per mizeraj salajroj hindojn, malajojn, palestinanojn, kiuj ne plu scias kien iri.

Oni nun multe parolas pri MORALO INTERNACIA, sed tio estas nova, ĉar tiu moralo silentis kiam Sovetio invadis Afganlandon, Ĉeĥoslovaklandon, Hungarlandon, kaj Sirio Libanon*. Kiu kapablas predikti, kio okazus postmilite, dum reĝo Fuad el Saŭda Arabio proponis mem ke "per diskuto oni povus konsenti ke Irako rehavu plian petrolon kaj havu denove aliron al la maro", kio estis antaŭe diskutita vane inter Irako kaj Kuvajto ? Ĉu post milito kontraŭ Irako iniciatita de Okcidento, ĉiuj araboj ne fariĝus malamikoj de Okcidento, kiu trenintus ilin al milito kontraŭ samuloj?

Ĉu oni ne devus lasi la arabojn arbitracii mem tiun konflikton inter araboj, kaj ĉu eklipsema internacia moralo, tute abstrakta ento, valoras, ke oni verŝu eĉ nur unu tute konkretan guton da franca juna sango?

**J. MANCEAU**

* Mi scias ke ĝenerale oni nun skribas Afganio, Francio ktp; mi ankoraŭ hezitas uzi tiun i-postaĵon, tiom longe kiom geografio ne signifos landon de la geografoj... Aŭ ĉu? Tiam, cetere, mi estus tre dankema al tiu, kiu povus informi min pri "kie do troviĝas ekzakte tiu lando gastronom-i-o?

Se oni ne plu volas la fundamentan "UJO", "lando", kiu ne pli longas estas ankaŭ fundamenta; Sirio ne estas escepto, ĉar la loĝantoj de Sirio neniam estis Siroj...

La afero estus ankaŭ pli simpla kiam oni parolas pri brazillando kaj brazilio (la ĉefurbo) : nenia konfuzo eblas.



## DU EKZEMPLOJ DE BELAĴOJ DE LA ARMILA KOMERCO

*Antaŭvidante partoprenon en eventuala milito kontraŭ Irako, "Francio" (kiu estas tio?) sendis en Arabion kelkajn sturmaviadilojn "Miraĝo". Sed tiuj aviadiloj restos surtere kaj ne flugis, ĉar ili povus esti konfuzataj kun aliaj de sama tipo kaj de sama fabrikado iam venditaj al Irako.*

*Oni scias ankaŭ, ke Irako posedas (car ĝi aĉetis de Francio) kelkajn "Ekzocetojn" (vi scias, tiu rakedo inventita kaj fabrikita en Francio, per kiu la argentina armeo pereigis britan krozoŝipon ĉe la Malvinaj - Falkland - Insuloj). Do iu sama Ekzoceto, fabrikita en Francio, povus same trafi kaj pereigi francan militŝipon.*

*Sed ne grave : sur tiaj ŝipoj ne troviĝas fabrikistoj kaj vendistoj de armiloj.*

**VALO**



## De la "socio de enfermigo" al la "socio de kontrolo"

Ĉiuj fakuloj interkonsentas konsideri, ke nia socio travivas krizon kaj ke la nuna periodo estas grava turnopunkto por la evoluo de la mondo.

En artikolo aperinta en la monata franca revuo L'AUTRE JOURNAL (La alia gazeto) filozofo Gilles Deleuze, unu el la fondintoj de la kontraŭpsikiatria movado dum la sepdekaj jaroj, prezentas diskutindan vidpunkton.

Laŭ li, ĝis nun ni vivis en "socio de enfermigo" tra diversaj institucioj : unue la familio, poste la lernejo, la hospitalo kaj foje la karcero, ĉiuj ĉirkaŭbaritaj lokoj funkciantaj kiel muldiloj sendependaj unu de la aliaj, kun propraj regularoj.

Nun tiuj institucioj travivas krizon, ĉar, laŭ Deleuze, ili ne plu kongruas kun la ekaperanta "socio de kontrolo", kiu iom post iom devus anstataŭi la malnovan "socion de enfermigo". La kontrolo estas modulado kiu ŝanĝus momenton post momento sen stabiliĝo : la entrepreno anstataŭas la fabrikon, la konstanta laborkleriĝo la lernejon, la magneta karto la karcergardiston, ktp. La individuoj iras de medio al medio. La elektronikaj sistemoj ebligas ilin kontroli per la diversaj sliparoj, kiuj akompanas ĉiujn civitanojn.

Ĉu tiu nova socio, kiu ŝajnas pli milda, pli malferma, ne estas fakte pli inside truda ol la "socio de enfermo", kiu superregis ĝis nun la homojn? Gravas ne plu la bariloj, sed la komputoroj, kiuj lokalizas la situon de ĉiu : leĝan aŭ neleĝan, kaj efektivigas la universalan moduladon...

La sindikatoj ne plu estas taŭgaj por tiuj novaj sociaj formoj. Estus necese trovi aliajn rimedojn por rezisti kontraŭ la **marketing** (merkatado?), kiu estas la nova ilo de la superregado.

"La aneloj de serpento estas ankoraŭ pli komplikaj ol la truoj de talpejo."

**J.G.**

************************************************************

*Ĵus aperis la nova kasedo de*

**NIKOLIN' : "Laŭ lula ondo"**

***Ĝi enhavas ĉefe lulkantojn kaj - kvazaŭ premie - la belan Somertemp' de Gershwin. La tekstoj estas tradukitaj de Baghy, Rossetti, Silfer kaj Martinelli... Jen garantio pri bona kvalito, ĉu ne?***

***Jen la 11 titoloj :***

| | |
|---|---|
| Serena lulkanto | Bonan nokton |
| Ho bebo ekdormu jam | Israela lulkanto |
| Siberia lulkanto | Karelia lulkanto |
| Vi kuŝu neste bela beb' | Patrina man' |
| Tenere ĉirpas gril' | Vjetnama patrino |
| | Somertemp' |

*Havebla ĉe Nicole PAIROUX, Rue Saint-Luc 35, B-5004 NAMUR aŭ pere de la reto de LF-Koop, la eldoninto.*



# Ĉies voĉo

## ĈU VERE NI BEZONAS LA LEVJATANON?

### PLIA ĈENERO

*(Vd. L! 90)*

*Samideano Garolo enkondukas la 35an ĉenleteron, citante la PIVan difinon. Laŭdinde! Kaj li, malŝparante la penon, eĉ donas duan. Bedaŭrinde! Nome, tiu dua difino estas pli LA tezo de la marksismo ol vera difino.*

*Refreŝigi la memorojn ŝajnas al mi oportuna.*

*Ekde la pratempoj, en ĉiuj homaj grupoj estiĝis gvidantoj. Unue en la familia rondo, poste en la vilaĝoj ĝis en la nunaj landoj. Tio estis kaj daŭre estas necesa.*

*La naturo, kiu senkompate regas la mondon, emas elimini la plej malfortajn estaĵojn, celante plifortigi la diversajn vivantajn speciojn. Siaflanke, la prahomoj malkonsentis pri tiu abomena naturleĝo, rilate al sia familio. Iom post iom, socia vivo estiĝis : vilaĝoj, urboj, landoj grupigis la homojn. Aperis la bezono al leĝoj, kiuj devis ebligi pacan komunan vivon. Sed la homoj, kiuj logike estis protektantaj siajn familianojn, eĉ la plej malfortajn, pro egoismo, daŭrigis la uzadon de la eliminadleĝo kontraŭ la aliaj kunloĝantoj. Kaj tiam naskiĝis la embrio de ŝtato. Tiu embrio fariĝis, tra la jarcentoj, monstro kiu manĝas siajn idojn.*

*Tamen ni ne dorlotu nin en dolĉaj ĥimeroj! Se ni deziras justecon, protektadon de la plej malfortaj, socian progreson kaj, pli teretaĝe, aŭtoŝoseojn, malsanulejojn, fervojojn ktp., ni ne povos samtempe postuli la foriĝon de la ŝtato.*

*Kia devas esti la formo de tiu ŝtato estas alia problemo, kiu eble indas alian ĉenleteron. Mi aldonas, ke ne la principo de ŝtato estas malbonaĵo, sed la homoj kiuj posedas la potencon ofte ne uzas ĝin taŭge kaj, pli bedaŭrinde, honeste.*

*La avideco de la homoj estas senlima.*

*Lasi-fari! Ve al ni! Ĉu vere estas ankoraŭ eble kredi, ke tiu filozofio neniam homojn mortigis? Kion dirus, ekzemple, la postvivantaj usonaj indianoj pri tia "lasi-fari"? Aŭ, se ili estus kapablaj paroli, la afrikaj elefantoj aŭ la amazonaj arboj, ktp. ? La nunaj ekologiaj problemoj suficus por pravigi la neceson de ŝtato, eĉ de tutmonda "superŝtato", kiu, feliĉe jam aperas ĉe la horizonto.*

*Al ni, la konsciaj civitanoj, estas destinata la devo klopodi por la plej bona ŝtatformo.*

***Henri CASTIAU***

## KONTRAŬDIROJ

(Vd. L! 90, p.40)

Bernard Aunis eltrovis kontraŭdiron inter la paĝoj 55 kaj 108 de la libro de Lorulot. Ĉu? Nu, eble. Memkontraŭdiro estas homa : montru al mi unu homon, kiu neniam sin kontraŭdiras.

Tamen, en tiu ĉi okazo, pardonu min, mi ne vidas kontraŭdiron.

La naturo estas bela, jes. Bela kaj kruela kiel iuj belulinoj. Kruela? pli ĝuste indiferenta. En ĝi egale kunekzistas belegaĵoj kaj abomenaĵoj.

Pro la belegaĵoj la dikredantoj laŭdas kaj gloras sian dion. Pro la abomenaĵoj Lorulot kaj mi ne povas kredi, ke la naturon kreis kaj regas dio bona kaj kompatema. Aŭ li ne estas tia, aŭ li ne ekzistas.

Vi diras : Dio estas ĉiopova, kaj vi diras : Dio estas Amo. Kial do li toleras la malamon, la mizeron, la malsaton, la suferegojn? Kial li permesas la torturon, la murdon, la militon? Jen estas kontraŭdiro! Aŭ ĉu la vortoj bona kaj kompatema havas alian signifon pri dio ol pri homo? Sinjoroj kredantoj, bonvolu tion klarigi al ni.

Bernard Aunis mencias kiel ateistojn Stalin kaj Ĉeaŭĉesku. Ĉu veraj ateistoj? Ĉu el marksismo-leninismo ili ne faris ian diaĵon? Sed mi konsentas : verŝajne ili mem ne kredis pri ĝi, en ilia menso ĝi estis nur opio por la popolo. Tiaj homoj kredas nur pri sia propra ambicio.

Alia ekzemplo : Saddam Husejn volonte sin pretendis laika, eĉ ateista, kiam li kontraŭbatalis la religian fanatikon de la islamistaj iranaj ajatolahoj. Nun li provas amikumi kun ili, kaj vokas ĉiujn islamanojn al sankta milito. Ĉu do li tiel radikale aliiĝis? Laŭ mi, ne : li estas nek ateisto nek kredanto, sed nur oportunista politikulo, kiu ŝajne varias laŭ la cirkonstancoj, sed fakte sekvas rektan linion, al celo unu fojon signita : nome sia persona potenco kaj gloro.

Stalin kaj Ĉeaŭĉesku persekutis la kristanan (ortodoksan) eklezion kiel konkurencan potencon sed ĝi estis pli forta ol ili : vidu nun la popolamasojn en la preĝejoj de Rusio kaj Rumanio, kiel en la katolikaj preĝejoj de Polio, kiel en la moskeoj de la sovetiaj muzulmanaj respublikoj. Malgraŭ Lorulot kaj similaj homoj, ankoraŭ ne venis la tempo de ateismo...

**VALO**

## KREDO, FIDO...

Ergoto de Bonaero diras : Valo estas kredanto pri la scienco. Erare, kara Ergoto!

Ja en la XIX-a jarcento estis iuj "sciencistoj", kiuj kredis, ke la scienco iam klarigos ĉiujn "misterojn", kaj certigos al la homaro plenan kaj definitivan feliĉon. Nun ni scias, pro kruelaj spertoj, ke ĝi povas esti tiom danĝera kiom bonfara; kaj ke ĉiufoje, kiam ĝi solvas unu problemon, ĝi per tio mem levas plurajn aliajn, el kiuj ĉiu, siavice solvota, naskos plurajn novajn, ktp senfine.

Ni do ne kredas pri la scienco kiel pri iu dio, sed ni fidas al ĝi por pli kaj pli klerigi nin.

Ergoto de Bonaero diras : Lanti (kaj Valo) neniom komprenis el la Biblio, tial ke ĝi estas sekreta. Ĝin deĉifri povas nur inicitoj, kiel Moseo, Jesuo, Mahometo*, Ankaŭ Gurdiefo, Uspensko - kaj ilia disĉiplo Ergoto de Bonaero. Por ili ekzistas, jam 6000 jarojn antaŭ Kristo, absoluta Vero, kaj io perfekta. Perfekta, t.e. finita, neŝanĝebla, neevoluonta. De antaŭ 80 jarcentoj, sed fakte eterne.

---

* Ergoto prefere skribas Mahomedo, ĉar "Mahometo estas eta Mahomo". Sed kio aù kiu estas Mahomo? Persone mi preferus Mohamado aù Muhamado, pli fonetika transskribo de la araba nomo, sed mi sekvas Zamenhofon, kiu skribis : Mahometo.

Al tiu statika koncepto ni kontraŭmetas la dinamikan koncepton pri senfina perfektigado (mi diras senfina, ne konstanta, kontinua, ĉar estas ja periodoj de stagnado, eĉ regresado, sen entute la procezo iradas laŭ sama direkto).
Sendube tiuj konkeroj kaj akiroj de la scienco aspektas kiel bagateloj al tiuj, kiuj posedas la Veron kaj konas la Perfekton. Al tiu posedo kaj kono ne estas kompareblaj niaj veretoj, partaj, detalaj, malperfektaj kaj ĉiam provizoraj. Sed ili, iom post iom, paŝon post paŝo, pliigas kaj antaŭenigas la homan scion kaj povon. Al ni sufiĉas tiu modesta ambicio.

**VALO**

## 15a kaj 16a INTERNACIAJ SEMAJNOJ DE ESPERANTO...


Pro niaj pasintjaraj sukcesoj, ni organizos venontan someron

**DU INTERNACIAJN SEMAJNOJN.**

* La unua okazos en vilaĝeto de franca montaro Alpoj, 1000 m super marnivelo, 30 km sudoriente de Ĝenevo, en mirinda ripoza loko, kadre de bela feriejo, de la 24a ĝis la 31a de aŭgusto 1991.

* La dua okazos ĉe mediteranea marbordo, en havenurbo SETE, 30 km okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro, de la 7a ĝis la 14a de septembro 1991.

Ni proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto. Ni havos trinivelajn kursojn zorgatajn de eminentaj instruistoj, inter kiuj S-roj Moirand kaj Babin kaj S-ino C. de Lorenzi.

Vi povas kapti okazon ferii tri semajnojn en Francio; la dua semajno estos libera : tiel vi povos vojaĝi tra Francio kaj viziti viajn korespondantojn aŭ, laŭ prefero, vi povos plurestadi en la montara feriejo. Kiel ĉiujare vi trovos vere internacian etoson. Ankaŭ... banado, ekskursoj, belaj vesperkunvenoj kaj bona manĝo ĝojigos vin.

Tre modesta restadokosto. Ambaŭ domoj taŭgas por rulseĝoj. Ebleco tendumi proksime. Aliĝo/informo : ESPERANTO, 5 rue Docteur Roux, F-34000 MONTPELLIER, Francio.

---

Ni jam havas 340 perkorespondajn lernantojn en diversaj landoj el Afriko. Ni povus ankoraŭ multe plialtigi tiun nombron sed ni bezonas financan helpon. Pro tio ni kolektas kaj vendas poŝtmarkojn. Ĉu vi volas helpi nin? Sendu al ESPERANTO-KURSO, BP 7073, F-34080 MONTPELLIER ĉiujn ajn P.M. novajn aŭ stampitajn, kiujn vi trovos. Antaŭdankojn de nia Afrika Servo.




PLUSKRIBAS ERGOTO

Kopion el la MISPREZENTO DE VALO mi sendis al li,kun
jena letero: "Rilate la daŭrigon de viaj komentoj pri:
"KARAKOLE, KARAMBOLE!",en ĈIES VOĈO: (RECENZE-KRITIKE,
LAŬTE! Nº 89) mi konstatis kun bedaŭro ke ĉifoje vi ne
estis justa,kaj tio certe okazis ĉar unue necesas tra-
legi la bazajn verkojn de la transforma psikologio aŭ
esotera KRIST-anismo (neeklezia!),kiu tute malsamas de
la konata kristanismo (eklezia!). Mi estas ESOTERA INI-
CITO, ne kristana kredanto! Do, jam dekomence, vi mal-
trafas, ĉar estas eraro de konceptoj! Kaj okazas ke vi
parolas pri unu afero, dum mi parolas pri alia tre di-
ferenca! Unue vi devus tralegi la tutan serion (10 vo-
lumetojn)en kiuj mi prezentas kelkajn resumajn skizojn
de la eksterordinara scio esotera!!! Poste, la bazajn
verkojn kies bibliografion mi ripete citas! Kaj, nur
poste vi kapablos juste komenti ion pri ĉi tiu supera
scio!.

Por la momento, eĉ se nevole, vi ja trompis la leg-
antojn de LAŬTE! Nº 89. Kaj tial, mi esperas, ke vi a-
probos la ĵus senditan artikolon al KRIBO,sub la tito-
lo: MISPREZENTO DE VALO, kies kopion mi kunsendas.Kon-
traŭe, plue okazos ke dum mi parolas pri la kaŝita aŭ
nekonata parto de religio-filozofio-psikologio-kosmolo-
gio, vi parolos pri tio nekaŝita kaj konata de ĉiuj!!!
Estas kiel se mi parolus pri papilioj, kaj vi pri flu-
gilhavaj testudoj! Notu bone: mi parolas pri esoteraj-
eteraj "papilioj", ne pri surteraj-teraj testudoj!(tu-
te senflugilaj!) TRE KORE KAJ AMIKE SALUTAS VIN, EdeB.

Al ĉi tio sekvis la artikolo: "KREDO, FIDO" de VALO
kies fotokopion li sendis al mi. En ĝi, li montriĝas
pli komprenema... tamen... jen el paragrafo de Valo:
"Laŭ Ergoto de Bonaero, la Biblio estas sekreta; ĝin
deĉifri povas nur inicitoj, kiel Jesuo, Budho, Moseo.
Ankaŭ Gurdiefo, Uspensko kaj ilia disĉiplo EdeB." (*)

(*) MI ALDONAS: Kaj multaj aliaj pli! Jen ekzemple, la
genia Rubeno FELDMANO-GONZALIDO, aŭtoro de: "LA NOVA
PARADIGMO EN PSIKOLOGIO" (eldonita de SAT-bs; miaj ko-
mentoj pri ĝi aperis en LAŬTE Nº 69 NOV/86 p.35ª); kaj
la ankaŭ genia Anastazo LOPELUNO (=A. López Luna), ar-
gentina, E-ista filozofo, psikologo kaj verkisto,aŭto-
ro de pli ol 30 verkoj en Eo, inter kiuj:POR LEGI MAL-
RAPIDE; FILOZOFIA PROZO (mistitolita: LIRIKA(!),ĉar en

ĝi troviĝas nenio LIRika!); ARTO MALLERNI, kaj KVINTESENCO, kiuj enhavas la kvintesencon el lia profunda filozofio... bazita sur la Transforma Psikologio! (En: "ELIKSIRO LOPELUNA" ,208p. 22x17,JAN/85 bind., eksterordinara antologio el 12 liaj verkoj, legeblas mia ampleksa komentaro rilate la aferon!) (Preterpase, estas dank' al mia kara amiko LOPELUNO ke mi konatiĝis,antaŭ deko da jaroj, kun la plej supera scio el ĉiuj tempoj: la Psikotransforma Psikologio!!! Mi profitas la okazon por danki lian bonfaran influon!)

Kaj tra la mondo, troveblas miloj da ESOTERAJ INICITOJ! Jesuo, Budho, Moseo estas la plej renomaj!(Evidentas ke VALO neniam aŭdis ion pri la Gurdiefa Esoterismo; ankaŭ ne pri la ne-Gurdiefa Esoterismo!)

Poste VALO diras ke la "absoluta Vero estas statika koncepto"! Mirigas min ke li alvenas al tia konkludo, ĉar ĝuste la absoluta Vero tute ne estas statika koncepto, sed la plej dinamika el ĉiuj...tamen, okazas ke por la plena kompreno,necesas sperti la 4-an staton de konscio, nome, la kosmo-konscion, nomatan ankaŭ: stato de ekstazo aŭ iluminiĝo!

En aparta letero,VALO petas pruvon pri miaj asertoj, ĉar li bezonas kontentigi sian raciemon. Nu,kara VALO, en miaj libretoj, (oportune senditaj al vi), troveblas nur "voj-montriloj"! Nome, ili montras la trairendan "vojon" (la 4an vojon aŭ vojon de l' sagaca homo!), se oni kapablas sekvi ĝin, por atingi la pruvon!

Neniu povas fari anstataŭ vi la psikologian laboron kiun vi mem devas fari!!! La disvolvo de la teĥnika apliko troviĝas en la koncerna bibliografio,kiun mi jam plurfoje citis en la paĝoj de LAŬTE!,kaj kiun vi devas trastudi, se vi volas atingi rezultojn! Kaj ĝis vi ne komencos mem-observi la funkciadon de viaj tri centroj (intelekta,emocia k instinkta-motora), kaj praktiki la Memoron pri vi (por aliri al la 3ª konsci-stato),vi ne kapabliĝos por travivi la 4-an konsci-staton, kiu konsistigas la plej eksterordinaran sperton,kiun homo povas havi en sia surtera vivo!

¡Tiam, oni ekhavas la pruvon!

ERGOTO DE BONAERO



## EKONOMIO SOCIALISMA

Rigarde al la stranga situacio de USSR (Sovetunio), ke ja ĝi volas transformiĝi al pli merkate diktata sistem', sed tion apenaŭ povas sen preskaŭ ruinigi sin mem aŭ almenaŭ kunhaviĝi je fatalaj transiro-konsekvencoj, postuleblas jena antaŭrepar' al ajnaj tiaj paŝoj :

1-e. Kiel estas tute klare por ĉiu privata firmao, oni devas havi ekzaktan superrigardon, en ĉiu subdivido de l' firmao, pri la ligita kapital', t.e. stokoj da varoj, materialar', krudmaterialoj, duonpretaj materialoj, restaĵoj (en ties baze taksata valor'), monrimedoj, kontantaĵo, postuloj je pagado far klientoj resp. deprenintoj, postuloj je ankoraŭ ne entroviĝintaj liveradoj (materialoj; rezervopartoj maŝinaj; funkciiga material' - kiel ekz. oleo, ŝmiraĵo ktp, ktp.)

Tiu superrigardo - inventarado - devas esti absolute ekzakta, neniel falsa aŭ duona aŭ beligita! Je la plej eta manketo tiurilate la stariginto(j) devas respondi pri tio antaŭ firmaa tribunal', kiu punos ne nur per elĵeto, sed ankaŭ per persona pagado kaj/aŭ transdon' al juĝejo por enkarcerigo vivolonga!

Tiu estas privata firmao. Ŝtata entrepreno devas esti ankoraŭ multe pli rigora. La ŝtato povas ankaŭ surloke pafmortigi...

2-e. Dum la transportado de unu firmao aŭ uzino al alia resp. liveradoj ne rajtas esti iu ajn relantigo (= re-lanta -igo) aŭ vana, vaka veturado, do jam en privata sistem' neniam devas ekzisti neuzita kapacito de transportiloj, ne devas okazi tro longaj haltiĝoj (se entute iuj), la malŝarĝado devas fariĝi momente rapida, senprokrasta, aŭ elsaltos el la postenoj kaj laborlokoj ĉiuj kunlaborintoj je tiu afer'. Tio estas privata firmao. Ŝtato povas ankaŭ tuj pafmortigi la responsulojn... Ŝtato povas ankaŭ ordoni al sia armeo kunhelpi per ties kamionoj. Ŝtato povas ankaŭ konfiski privatajn aŭtomobilojn kaj engaĝi ilin en la transportado.

3-e. Privata firmao faras kalkulon pri ekonomieco de la agoj, t.e. pri la kostoj, la materialoj, la homoj laborontaj, pri la tempodaŭro, la pretiĝodatoj kaj la prezo

postulenda kaj merkate publikigenda en kompar' al aliaj firmaoj! Tion devas - kiel MINIMUMO - ankaŭ fari ŝtata entrepreno, en ĉiu uzino, ĉiu departamento, ĉiu kombinato, ĉiu vendejo, ĉiu laborejo ktp.

Nur kiam tio farita, oni povas sendi kontrolistojn SENDEPENDAJN, por superrigardi la prezo-trovadon, por kontroli la kostojn enskribitajn kompare al eventuale envere pli bazaj aŭ pli altaj.

Ŝtato devas havi revizorojn, kiel havis la reĝolando de Karlo la Grando, sendinta al siaj bienoj kaj tra la tuta landetaro senditojn de kontrol', ankaŭ MEM aperadante jen tie jen ĉi tie, tute subite, tute neatendite, tiel ankaŭ en Saksujo la konkeritan, de kie entute Germanio kaj poste la Prusoj ekhavis pro tradicio tiun ideon de ekzemplodonaj bienoj kaj de kontrolistoj vojaĝantaj kaj de reĝo propra subita aperado kun TREMIGO al ĉiuj subuloj!

La tremigo estas necesa en ĉiu privata entrepren', nur post kiam ĉio glate funkcias, la superuloj grande povas belanimiĝi kaj amikiĝi kun siaj kunlaborintoj, ĉu laboristaj, ĉu oficistaj! NUR POST KIAM ĈIO GLATAS!! Same ankaŭ devas agi la ŝtato. Kaj la korupto estas neniigenda.

Pro tio ke en orienta bloko oni ne faris tion, tro faris da duonaĵoj kaj da falsaĵoj, trompante SIN MEM PER TIO, tial ankaŭ nun eĉ la transiro al la enkonduko de pli merkate diktata sistem' tiel malbone marŝas.

La malcentraligo necesas ege, sed same ankaŭ la ekonomiecigo en ĉiu branĉo, ĉiu uzino, ĉiu subentrepren(et)o! Ekonomieco tamen ne signifas nur ŝpari kaj ŝpari. Oni ankaŭ devas havi la kuraĝon forĵeti tion, kio ne taŭgas, kio tro oldas. La investado je novaĵoj - kompreneble kun kalkulado streta, akra - ne rajtas ŝparati. Tio estus ŝparado je la loko malĝusta. Do la bankoj de la Ŝtato devas havi departamentojn, en kiuj inĝenieroj kaj fakuloj aliaj laboru por doni pli bonajn konsilojn al la ŝtatobanko je kreditigoj, ankaŭ al la ministerioj, en urboj, sublandoj kaj tutlando devas asisti pli bonaj konsilistoj! Ĉiu privata firmao havas "cerbulojn" ("ovokapulojn"), kial ne la ŝtato, la urboj, la entreprenoj, la branĉoĉenoj ktp, ktp?

Ŝajnas al mi, ke la oriento havis ĝis nun tro da armilar', sed tro malmulte da cerbo, tial - kiel la dinosaŭroj - ĝi pereas komplete!

"Dietrich von Bern"



## PRI HOMAJ BEZONOJ

(Responde al Garolo, "Laŭte!"-89)

**"La homoj ĉie havas la samajn bezonojn"** - ripetas Garolo. Kaj certagrade li pravas. Efektive, bazaj homaj bezonoj estas samaj: manĝi, trinki, varmiĝi dum frostas ekstere, kaŝi sin en ombro, kiam trovarmas ktp. Sed se ni komencos rigardi pli atente, ni tuj trovos ke en reala vivo de konkretaj homoj multo dependas de klimato, de naciaj kutimoj, de alpropriĝitaj personaj kutimoj. Kaj evidentiĝas ke bezonoj ege varias. Mi ne estas fumanto kaj neniam sentis inklinon al fumado. Tial mi malfacile komprenas suferojn de homoj, lasitaj sen fumaĵoj. Sed - tutcerte - fumeganto sen fumeblecoj suferas kaj li/ŝi asertas ke fumi estas lia/ŝia vibezono, baza bezono. "Mi simple ne povas vivi sen tio!" Ni ĉiuj renkontis tiajn homojn. Mi memoras kiel mi legis artikolon pri nivelo de mizereco de solaj patrinoj en Anglio. La artikolo prezentis monsumon, ricevatan de la patrino por flego de infanoj, kaj ĉiusemajnajn elspezojn. Intervjuita virino plendis, ke ŝi ne povis aĉeti dentopaston al siaj infanoj. Kaj en la listo (de faritaj aĉetaĵoj) estis: cigaredoj, kosto - pli ol unu pundon. "Do, por cigaredoj troviĝis mono, sed por dentopasto ne!" - indigne elkriis mi. Verŝajne, mia indigno ne estis tute senbaza (ja fumi ne estas baza homa bezono!), tamen pensinte pri tiu virino poste, mi hontis pri mi. En tiaj kazoj necesas demandi sin mem: kaj kio estas BAZA por vi, ĉu vere tio estas "baza homa bezono"? Mi persone suferas sen fruktoj/legomoj kaj... kafo. Mi ĉiam memoros obsedajn sonĝojn (aŭ eĉ tagajn viziojn) pri ĉerizoj/oranĝoj/pomoj (kaj aliaj fruktoj) dum mia gravedeco (jaro: 1980). Estis frua printempo, vendejobretoj en Rigaj, fruktovendejoj malplenis, kaj por bazaraj varoj mi ne havis monon (kilogramo da freŝaj tomatoj kostis kvinonon de mia monata salajro). Do mi konstante vidis en sonĝoj diversajn fruktojn. Kaj feliĉigi min en tiu epoko facilis - sufiĉus kelkaj oranĝoj kaj citronoj. Pardonu pro tiu flankeniro. Sed mi konstatas ke eĉ t.n. bazaj bezonoj estas tro variaj. Francoj verŝajne opinias vindrinkadon sia "baza bezono", germanoj - bierdrinkadon, kaj por

ukrainoj gravas barĉo (plej ŝatata nacia plado). Kaj vivo iĝus neeltenebla por angloj sen "bela taso da teo" (D. Orwell verkis specialan eseeton pri "A Nice Cup of tea"!) Do eĉ sur nivelo de bazaj homoj bezonoj ni vidas diferencojn, depende de naciaj kutimoj kaj moroj. Mia hungara amiko iam ŝercis, ke turkoj malsukcesis islamigi hungarojn ĉefe pro hungara fideleco al gulaŝo, do al "malpura" porka viando. Do mi ege dubas pri eldiroj de Garolo, ke kontentigi bezonojn sur nia eta terglobo estas tiom simpla kaj uniforma. Ermitoj, kiuj vivas nur per akvo kaj pano, kaj vestas minimuman kvanton da vestoj sur sin, en nuna mondo malmultas.

Sed ja ne nur "per pano unusola vivas homo". Ekzistas ankaŭ spiritaj bezonoj, kulturaj bezonoj. Mi tute ne komprenas **kial** ĉe Garolo amo al sia patrujo nepre kuniras kun malamo al patrio de najbaroj. Ĉu tia kunligo estas nepra? Neevitebla:? Io preskaŭ aŭtomata? Mi renkontis multajn homojn, kiuj amas sian patrujon - kaj ne malamas tiujn de najbaroj. Kompreneble, ke kun najbaroj rilatoj estas pli komplikaj ol kun loĝantoj de foraj landoj (tial oni pli facile idealigas ilin, verkas laŭdajn odojn por foraj landoj...) Ami abstraktan homaron pli facilas ol konkretajn popolojn, des pli - sian propran (kaj se ĝi estas eta, nekonata, ne fama?) kaj najbarajn. Jes, nomi sin mondcivitano, sennaciulo **pli facilas** - tiel vi eskapas turmentajn pensojn pri via identeco. Sed mi kuraĝas aserti ke bezono koni siajn radikojn estas BAZA homa bezono. Pri tio, ke el beboj eblas fari ion ajn laŭ certa modelo, oni konis jam en pasinteco. Kiam, ekzemple, en la 15-16 jarcentoj turka armeo tre ofte invadis Ukrainion, ĝi kutime prenis "jasiron" (kaptitojn). Virojn oni sendis sur galerojn, inojn - kiel sklavinojn aŭ en haremojn, kaj bebojn oni edukis kaj poste el ili formis elitajn militistajn trupojn, t.n. "janiĉarojn". Kaj poste tiuj beboj (do, ukraindevenaj) estis sendataj en Ukrainion por novaj invadoj, novaj "jasiroj". Janiĉaroj famis per sia krueleco. Sed okazis diverse. Ĉiam troviĝis iuj el janiĉaroj, kiuj serĉis siajn radikojn - kaj foje kun teruro kaj konsterno ili trovis ke ili rabas sian patrujon. Kelkaj fuĝis kaj komencis novan vivon en retrovita patrujo. Tiu bezono koni "kies filo mi estas" estas unu el bazaj homaj bezonoj. Vi mem konas



aliajn ekzemplojn.

Ege malĝojigas min paroloj pri "obskurantismo" ekz. en Latvio kaj Litovio - sen iu ajn KONKRETA ekzemplo! Ĉu konkludi ke ĉio okazanta tie estas "obskurantismo"? Ĉu tia sinteno ne estas elmontro de stretmenseco?

Ĉu ekzistas unusola interpreto de "bazaj homaj bezonoj"? Por mi ekz. libere paroli gepatran lingvon estas baza homa bezono (ja finfine ne nur por manĝi-trinki ni vivas!) - mi pretas rezigni pri multo, por havi TION. Se tiuj bezonoj ne povas esti kontentigitaj - homaj suferas, do tio naskas konfliktojn. La nunaj konfliktoj en Sovetio radikas en pasinteco, frue aŭ malfrue ili devis ekesti. Mi loĝis en Latvio dum sep jaroj kaj povas atesti ke la latva loĝantaro ne havis ĉiujn eblojn kontentigi siajn bazajn kulturajn bezonojn. Eĉ ne nepre kulturajn. **Bazajn**: paroli latve en sia patrujo - en poŝtoficejo, vendejo, ŝparkaso ktp. (Imagu por momento ke francoj ne plu povas interkompreniĝi france en sia urba/vilaĝa poŝtejo, tabakvendejo, impostoficejo ktp. - ne en Kanado, sed en Francio). Kaj multaj maljunuloj simple ne scipovas la rusan, kiun trudis al ili unulingvaj oficistoj-alvenintoj. Samo rilatas litovojn, belorusojn, ukrainojn k.a.. Do, anstataŭ brulstampi la nunajn renaskiĝmovadojn per "obskurantismo", ĉu ne pli valoras studi la realan staton de aferoj, kialojn de konfliktoj, esencon de homaj bezonoj kaj eblojn de ilia kontentigo?

Mi skeptikas pri sennaciuloj. Mi pensas ke tio estas iluzio. Ĉiu homo kreskas en konkreta kultura (aŭ senkultura) medio, kaj vole-nevole ties trajtojn li akceptas. Kiam mi parolas pri "sennaciisma imperiismo" tio ne estas tiom absurda. Eble pli taŭgas uzi esprimon "sennaciula imperiismemo"? Lanti, kiu pretendis esti sennaciulo, restis franca, aŭ almenaŭ kun pensmaniero de "grandnaciano". Kaj tiu pensmaniero, pro imperia pasinteco, estas imperiismema. Jen ekzemplo. Antaŭnelonge mi tralegis bonan eseon de Igor Ŝafareviĉ pri naciaj problemoj en Sovetio ("Apartiĝo aŭ repaciĝo?"). Analizante la rusan pensmanieron li diras jenon:

*"Sed en nia sinteno al aliaj nacioj estas alia*

*malvirto, kiu estas tipe rusa; malkapablo vidi linion kiu dividas nin de aliaj nacioj, manko de interna konvinko en ilia rajto ekzisti kun sia propra nacia identeco. Kiom ofte mi aŭdis rusojn naive demandantaj kial ukrainoj, belorusoj aŭ litovoj ne volas lerni ĝustan rusan lingvon kaj ne volas iĝi ĝustaj rusoj. Ĉiuj ŝercoj, mokoj kaj sentaktaj vortludoj pri la ukraina lingvo radikas en nia maldeziro rekoni ukrainojn kiel apartan nacion kaj en nia fiasko kompreni kial ĉi tiuj "rusoj" tiom strange tordas nian lingvon.*

*Tion eble naskas perversa kompreno de nia natura sento de egaleco, ĉar ni emas pensi pri ĉiuj ĉi popoloj kiel niaj egaluloj kaj tuj (sen konsulti ilin) metas ilin inter rusojn. Sed estas facile kompreni kiel aliaj popoloj, speciale malgrandaj, estas terurītaj kaj furiozigitaj vidante la gigantan rusan tajdon irantan super ili, kiu pretas gluti ilin senspure".*

Ĉi tiu analizo estas tre revelacia. Mi konstatas, ke ĝi rilatas ne nur rusojn, sed ĉiujn t.n. grandnacianojn (tre malmultaj, kiel ekz. Jakelino, havas malfermitan menson kaj eskapas truditajn stereotipojn); malkapablo kompreni ke iu povas esti EGALA kaj tamen ALIA. Kaj ke alia havas samajn rajtojn kaj samajn bezonojn kiel vi. Do, kiam mi legas leterojn de Lanti pri nepre okazonta rusigado, kiu glutos malsuperajn ĉuvaŝan, turkmenan kaj aliajn "samnivelajn" kulturojn, mi vidas nur mensstretecon de grandnaciano. Kaj tial mi ne fidas ke Lanti sukcesis liberiĝi de sia grandnacia malkapablo vidi egalulojn en ĉiuj nacioj, sendepende ĉu grandaj ili estas, ĉu malgrandaj. Kaj tial mi ne fidas sennaciulojn. Pli: mi opinias tion iluzio. Ekzistas kulturitaj homoj, kiuj sorbis multajn elementojn el diversaj kulturoj, kaj ilin mi salutas. Kaj plimultiĝu ilia kvanto! Sed ĉu nomi ilin sennaciuloj?

**Oksana**

**EL VORTOJ DE KAMARADO E. LANTI**

Unueco - Diverso - (p.45)

Malgraŭ ĉiaj obstakloj la homaro marŝas al **unueco.** Ĉu oni devas timi, ke tiu unueco estos monotona, samkolora? Tute ne! La etnikaj, klimataj fortoj daŭrigos agi sur la individuojn kaj malhelpos unutonecon. La indiĝenoj ĉiam konservis sian originalecon.
Timo pri eble unutoneco, eĉ se ĝi estus pravigita, ne povas cetere forgesigi al ni la nune realan malbonon: la nacioj eligas el siaj poroj venenigan naciemon, kiu estas grava baro al dezirinda universaleco.

(XI-1920)

El la antaŭparolo de L. Banmer:

Certe neniam k neniel Lanti intencis trudi siajn "herezaĵojn" kiel oficialaĵojn en SAT. Kaj mi estas certa, ke se troviĝus iu ajn SAT-ano, admiranto de Lanti, por proponi tion, li mem plej energie kontraŭstarus. "Mi antaŭvidas la tagon, kiam mi devos kontraŭbatali fanatikajn sennaciistojn", li jam kelkfoje diris. Cetere mi havas la firman konvinkon, ke inter tiuj, kiuj nuntempe batalas kontraŭ Lanti, kelkiuj ne konscie prezentas ian karikaturon de liaj ideoj, anstataŭ lojale ilin kritiki.

(1931)

## KOMPATINDA KIU ?

*S-ro Jamart invitas min konkludi pri "Kompatinda Irlando" (Laŭte 90). Mi estas el Irlando kaj ne sentas min kompatinda. Mi konkludas, ke li havas nenion por diri. Eble taŭgas io tia por franclingva gazeto, sed en E-o oni ja postulas ion pli ol sekaj skemoj, ion pli bazitan sur spertoj pri priparolata lando. Povas esti ja ke irlandano legos! Ĉion eblan kontraŭ la regantaj instancoj diris jam irlandanoj mem : sufiĉas legi Joyce - aŭ lastatempe Paul Durcan. En iliaj bildoj mi rekonas min kaj mian landon - kaj foje hontas. Sed mi preferas tian honton al la sento ke mi estas peco en ies ludo, ĝena splito kiu fuŝas glatan fluon de Racio, apenaŭ pli ol vorto en la misteraj buŝoj de la 4-5 miliardoj kiuj diris por S-ro Albault "Koreon". Jen vorto el mia Irlando :*

*Amoris min lentuga bukla knabo el Konamara,*
*nun grava cerbĥirurgo en Francio*
*(laŭdire preskaŭ dudek jarojn edzo*
*de tre agrabla viro el Fontainebleau).*
*Kiam ni ambaŭ aĝis dekdu jarojn*
*ni interŝanĝis amleterojn dum lecionoj pri Religiaj Scioj*
*ĝis Panjo fosis en la poŝoj de mia jako*
*kaj trovis stakon de l'transcende erotikaj paperpecoj.*
*La Patro batis min kaj Panjo mokis,*
*ĉefpastro longe promenigis min en la lernejarbaro*
*kaj inter nigraj kaj gravedaj paŭzoj flustris raŭke :*
*necesas ĉesi!*
*Mi jesis kaj rezignis samseksamon*
*sed ĝis nun mi ne povas memori sen iomete da embaraso*
*ke en Irlando dum la 1950-aj jaroj*
*mi estis dekdujara samseksemulo!*

**Paul Durcan** *(el "La Berlinmura Kafejo", Belfasto 1985)*

**Meva Maron**

ĜOJAN NOVJARON!






# -IĜ-

Kdino Barstovska (L! 89, p.62) ne renkontos la "interesiĝa"-problemojn se ŝi sekvos la ĉi-suban rezonadon, lingvistike logikan sed de lernolibroj ne sekvatan.

Regulo 1. La sufiksoj "**ig**" kaj "**iĝ**" estas ambaŭ verbkarakteraj, t.e. ili unue formas verbojn, el kiuj oni poste pluformas aliajn vortkategoriojn (manĝigi → manĝigi-o-manĝigo → manĝigo-a=manĝiga → manĝiga-e-manĝige). Ĉi tiu regulo, kvankam grava, tamen ne koncernas la "interesiĝa"-problemon.

Regulo 2. Pro siaj signifoj, ambaŭ sufiksoj aldoniĝas nur al verboj **ig**- al ĉiaspecaj verboj, **iĝ**- nur al transitivaj verboj. La signifo de **ig**- estas "agi tiel ke iu aŭ io faru alian agon". La gramatika nomo de tiu esprimmaniero estas "faktitivo" = "kaŭzi duan, alian agon". Do : lavigi = fari ke iu lavu, purigi = fari ke io puru aŭ estu pura (ne * "fari ke io pura"!), prezidentigi = fari ke iu prezidentu aŭ estu prezidento, nunigi la ekzekuton = fari ke la ekzekuto nunu (= estu nun).

Simile, sed ne same, statas la afero pri **iĝ**-, nur malpli komprenklara. La signifo de **iĝ**- estas "ricevi agon, esti je la fino de ago, esti la rekta komplemento de ago, kiun faras (kaŭzas) iu antaŭa subjekto kiun oni ne volas aŭ ne povas mencii, nek vidi." Do oni vidas kaj esprimas nur tion kio okazas al la originala rekta komplemento (la nuna subjekto), ne vidante nek esprimante ke la agon kaŭzis iu aŭ io, ke la ago originas ekster la (antaŭa) rekta komplemento, kiu jam fariĝis la subjekto de tia "pasiva" ago. Estas kvazaŭ la ago (= la verbo) decidas mem ke ĝi okazu, kaj ke la nova subjekto (= la originala rekta komplemento), kiu nun staras en la centro de la atento, nur formale kaj nevole kiel subjekto faras tiun de iuj ajn cirkonstancoj kaŭzitan agon. Per tia transformo la ago fariĝas samtempe aktiva, kvankam neintence kaj nekonscie farata de la nova subjekto; do ĝia aktiveco ŝajne ne estas tre aktiva. Io simila kazas en la signifo de verboj kiaj "ricevi" : la subjekto ne aktivas, kvankam la tuta frazo estas en la "aktiva voĉo". Notu ke en la "pasiva voĉo" la antaŭa aganto, antaŭa subjekto, estas vidta, sentata, prikonsciata, eĉ kiam ĝi ne estas esprimata (per "de"). Tio estas la nura, sed grava kaj utila, diferenco

inter la "mediala voĉo" (= iĝ-) kaj la "pasiva voĉo". "Medialo" (= mezaĵo) estas misnomo ĉar ĝi gramatike ne situas inter la "aktivo" kaj la "pasivo" kiel la antikvaj lingvistoj pensis (eĉ se ili inkluzivis la "refleksivon"), sed ĝi estas disvolviĝo el la pasivo pli foren el de la aktivo; estas la pasivo kiu fakte estas en la mezo inter la du aliaj.

Ĉar en la medialo (same kiel en la pasivo cetere) la originala rekta komplemento fariĝis subjekto, la medialo (kaj la pasivo) povas uzati nur per transitivaj verboj, t.e. nur per verboj kiuj povas havi rektan komplementon (dum la pasivo povas uzi pseŭdotransitivajn verkojn kiajn "ĉirkaŭi" -- "ĉirkaŭati", la medialo eĉ ne povas uzi tiajn [ĉar * "la amaso ĉirkaŭiĝas" havus du kontraŭajn signifojn]).

Flankfenomeno : same kiel oni povas analizi la faktitivon ("manĝigi" -> "igi manĝi") oni tion povas ankaŭ fari (sed tre malofte faras, pro malkompreno) pri **at-** kaj pri **iĝ-** : "la muso manĝatas" -- "la muso atas manĝi" = la muso suferas, ricevas, agon (el de kato, ekz.) kiu ĉi-kaze estas "manĝi", do "atas" = ricevas agon faritan de iu aŭ io; "la ŝtono laviĝas" -- "la ŝtono iĝas lavi" = al la subjekto (ŝtono) okazas ago, kiun ĝi, ĉar subjekto, mem pasive faras kaj kiu ago ĉi-kaze estas lavi. Do "iĝas" = "ricevas la plenan influon de ago kiu okazas kvazaŭ en la subjekto mem sed kiun agon en aliaj situacioj aŭ esprimoj la pasiva nuna subjekto ricevas el de alia aganto". Do "mi iĝas" = "al mi okazas ago kiun aliiam faras al mi iu aŭ io sed kiun mi nun sentas disvolviĝi pri mi sen ekstera aganto.

Regulo 3. Dum verboj konstruitaj kun **ig-** estas transitivaj, la verboj konstruitaj kun **at-** (= pasiva voĉo) kaj tiuj konstruitaj kun **iĝ-** (la mediala voĉo) estas netransitivaj kaj do ne povas havi rektan komplementon. La originala aganto ne povas esti menciata en la medialo, dum ĝi povas en la pasivo, per adjekto komenciĝanta per la prepozicio "de" (ne * "fare de", kiu estus duoblaĵo kaj krome havas du kontraŭajn signifojn, nek * "far", kiu estas gramatika monstraĵo).

Regulo 4. Ĉar la medialo povas farati nur el transitiva verbo, per la sufikso **iĝ-**, oni rajtas ellasi la indikilon de la transitiveco. Klarigo : Laŭ la genia Esperanta "Leĝo de Neceso kaj Sufiĉo" por la pluformado de vortoj, oni rajtas forigi parton de kombinita vorto (se tio ne ŝanĝas la signifon). En la bazaj transitivaj verboj (kiel "meti") la transitiveco ne estas indikata per speciala vorteto, do oni ne povas forlasi tion. Sed se ĉe netransitivaj verboj oni aldonas la transitivigan (tio tamen ne estas ĝia sola funkcio) sufikson **ig-**, kaj se la transitiveco ne bezonas indikati, oni povas forlasi tiun **ig**-indikilon, ĉar ĉiu scias, aŭ almenaŭ sentas, ke nur **ig-** estas forigita kiel la nur ebla transitiviga afikso verbsenca (**iĝ-** ja aldonatas nur al verboj, laŭ Regulo 2). Do dum ne eblas elpreni transitivecan indikilon mallongigante "laviĝi", la mallongigado eblas se la verbo havas la sufikson **ig-**. Anstataŭ "sidigiĝi" (kiu ne samas al "eksidi") oni povas diri "sidiĝi" (kiu tiel ne samas al "eksidi", ĉar "eksidi" estas plene aktiva kaj "sidiĝi" (el "sidigiĝi") havas nocion de pasiva ago, kvazaŭ oni estas sidigata de cirkonstancoj). Anstataŭ "purigiĝi" oni povas diri "puriĝi", kiu tiel ne samas al "ekpuri", ĉar "ekpuri" estas plene aktiva kaj krome havas nocion de komenco de ago, dum "puriĝi" (el "purigiĝi") havas nocion de pasiva ago, kvazaŭ cirkonstancoj purigas la subjekton, kiu tiel ne faras agon de "puri" nek de "ekpuri" sed de "iĝi puri" = kvazaŭ mem faras la agon de purigi, kiun agon aliesprime aŭ alisituacie faras al ĝi iu aŭ io alia.

Sekvante tiujn regulojn oni ne povas miskompreni. La sufikso **iĝ-** ĉiam rilatas al kaj do uziĝas kun transitiva verbo. Ekzemple ĉe "ci interesiĝas", ĝi rilatas al ĝia determinanto "interesi", kiu estas transitiva verbo, kaj sekve la signifo estas "ci iĝas interesi" = ci mediale ricevas agon (interesi) kiun normale (aktive kaj pasive) faras al ci io (ekz. libro) kio do interesas aŭ estas interesa. Do ci ne estas interesa en tiu esprimo! Ĉar "interesi" estas jam baza transitiva verbo, oni ne povis forigi la transitivecon, la sufikson **ig-**, kiu ne ĉeestas. Do "interesiĝi" ne povas rezulti el "interesa-ig-iĝi" = interesigiĝi. Sed nun alia ekzemplo : ĉe "ci maljuniĝas" la sufikso **iĝ-** ree devas rilati al transitiva verbo; ĉar "maljuni" estas netransitiva, ĝi devas rilati al "maljunigi", kaj la signifo do estas ke ci ricevas agon de "maljunigi" kvazaŭ ci mem faras tiun agon, aŭ, pli bone dirite, kvazaŭ la ago kaŭzas sin mem, kvankam normale (en la aktivo kaj en la pasivo) ĝin faras pri ci iu alia (Dio? Cia edzo?) aŭ io alia (ekz. la cirkonstancoj). Konscie aŭ ne, Zamenhof transsaltis la kvaran regulon, dirante, ke **iĝ-** (kaj **ig-**) povas aldonati al adjektivoj kaj substantivoj, kio malkomprenigas la proble-

mon, rezultantan en cian misan "interesiĝi" = "iĝi interesa". Se nepre ci deziras esprimi en unu vorto ke ci "fariĝas aŭ estas interesa", ci devus diri "mi ekinteresas (al iu) aŭ simple "mi interesas (al iu)", sed neniel "mi interesiĝas".

Notu ke en la franca lingvo la faktitivo ĝenerale esprimiĝas per la helpverbo "faire" + infinitivo ("faire cuire") aŭ aliiel ("durcir" = "rendre dur" = * "faire être dur"), dum la angla uzas "to make" por infinitivoj kaj "to make" kaj "to render" por adjektivoj, aŭ per sufikso, ekz. -en ("to harden"), aŭ per nenia ŝanĝo ("to walk a dog"), kaj kelkfoje per ŝanĝo de vokalo en netransitiva verbo ("to sit" -> "to set" ; eĉ trans. "to drink" -> "to drench" laŭ la ĝermana uzo, kaj la germanoj uzas ankaŭ sufikson (-ig) aŭ helpverbon ("machen") aŭ la dusencan "lassen"). La medialo esprimiĝas en la franca ĝenerale per la refleksivo (sub nomo de "subjektivaj pronomaj verboj") kiel en "la porte s'ouvre", kaj per la pasivo, dum en la ĝermanaj oni uzas multajn diversajn metodetojn por ĝin esprimi : ekz. (help)verboj kiaj "iri", "fariĝi", "veni + participo", kaj, multe en la angla, per la helpverbo "ekhavi" kaj per netransitiva uzo de neŝanĝiĝintaj transitivaj verboj. La malaja uzas i.a. specialan prefikson ("ter-").

**Marcelo Leereveld.**
Melburno.

E S O T E R I S M O / E S P E R A N T I S M O

En LAŬTE! Nº 90, VALO faras tre favorajn komentojn pri miaj verkoj pro kio mi kore dankas.

Sur paĝo 51-a li faras jenan rimarkon:

"Se la Sankta Biblio estas tiel esotera, penetrebla nur de inicitoj, ¿kial do ĝi estas la absoluta rekorda vendo-sukceso disvastigita tra la tuta mondo, en ĉiuj lingvoj, po milionoj aŭ miliardoj da ekzempleroj? aŭ ¿kial oni ne vendas kun ĝi la necesan ŝlosilon, kiu ebligus al ĝia tuta legantaro ĝin penetri kaj kompreni?"

MIAJ RESPONDOJ: (Al la 1ª demando:) Ĉar ĝi enhavas superan scion diecan, kvankam ne ĉiuj partoj estas samvaloraj, kaj ne ĉio estas "tiel esotera", ekz., la "Libro de Jobo aŭ la Alta Kanto de Salomono, kiuj estas alireblaj sen ŝlosilo! La 1ª instruas ke la sufero (merita aŭ ne) havas didaktikan valoron;kaj la 2ª, ke amoro ne estas malhelpo por spirita disvolviĝo!

(Al la 2ª demando:)Ĉar tiu esotera scio restis perdita dum ĉirkaŭ 16 jarcentoj. (Ĝi estis konata de la unuatempaj kristanoj, dum ĉirkaŭ la 3 unuaj jarcentoj) Kaj nur komence de ĉi jarcento, ĝi estis retrovita de la eksterseria filozofo greka-armena Georgo GORGIADO (pli konata kiel GURDIEFO), kaj nur post lia forpaso (en la jaro 1949ª) liaj disĉiploj iom post iom, komencis fari la tradukojn al pluraj lingvoj! Do, la diskonigo troviĝas en la komenca etapo! Kaj tiu scio, same kiel okazas al nia lingvo Esperanto, ne altiras multan atenton flanke de hom-amasoj!

Preterpase kaj modeste dirite, la (Resum-)tradukisto al Eo, de parto de tiu eksterordinara scio esotera estas la subskribanto de ĉi tiu artikolo. Kaj, en miaj resumtradukoj, mi invitas aliri la koncernan Bibliografion, sed ŝajnas ke ĝis nun eĉ ne unu sola Esperantisto akiris la nacilingan eldonon de la: "FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO," kiu estas la baza verko por la posta plena kompreno!! Do, jen ankaŭ plia kaŭzo de ne vasta disvastigo de la esotera scio, afero iel simila al la nevasta disvastigo de Eo! ¿Kion fari se ĝenerale la homoj ne multe zorgas pri kulturaj manifestiĝoj, kaj la afero (Esoterismo/Esperantismo)restas limigita al etaj rondoj? Tamen, eble iam ĉiu Biblio aperos kun Esotera ŝlosilo, kaj ĉiu nacilingva lernolibro, kun Ea ŝlosilo!

Ni plue fidu kaj esperu! ERGOTO DE BONAERO

## ĈU NI REVIZIU LA FUNDAMENTON ?

En sia sankta milito kontraŭ "Esperantalon" nia amiko Ergoto de Bonaero verve kondamnas la nomon "Mahometo" (uzita de Zamenhof), ĉar ĝi estas "eta Mahomo" (? Mi demandas : Kio aŭ kiu estas Mahomo?). Li kondamnas ankaŭ la substantivon "Kabareto", kiu estus... eta aro da kaboj! (Mi demandas : ĉu vere estas konfuzeblo inter kabaret'o kaj kab'ar'et'o ?).

Nun mi malfermas la Fundamenton, kaj foliumas la Uni-

versalan Vortaron.

Tie mi legas : bireto, enketo, magneto, skeleto, tapeto, debeto, sekreto, tualeto, ktp. Ĉu do ni diru enkedo, skeledo, sekredo, tualedo ? Kaj kio pri dieto (ĉu eta dio?), gazeto (eta gazo), soneto (eta sono), ripeto (eta ripo), marioneto (eta mariono), kc. ?

Krom la vortoj kun fina eto, ni trovos multajn kun aliaj finaĵoj similaj al sufiksoj (in, id, ar, on, ktp.) : kelnero, kamero, kolero, vespero, kariero, karcero, ktp, ktp. Ĉu ni forstreku ĉiujn tiujn vortojn el la U.V. ? Ĉu ni diru, ke kolero estas ero de kolo, kaj vespero, ero de vespero ?

Tiel pelante la sistemismon ĝis ekstremo, ne nur ni malpermesus al ni vortludojn, sed miaopinie ni ridindigus nin. Tro estas tro.

Anstataŭ "Mahometo" diru, se vi preferas, "Mohamedo" aŭ "Muhamado", kaj anstataŭ "kabareto" "kabaredo", sed lasu al ni la dieton, la gazeton, la soneton, la ripeton, kaj ĉiujn aliajn fundamentajn radikojn. Kaj eĉ lasu al ni la kabareton!

**VALO**

**-- ENIGMO --**



Kion reprezentas, laŭ vi, tiu ĉi desegnaĵo ? Bone esploru, kaj vidu la solvon sur p. 48.





# VORTOJ DE MALJUNULO

**valo**

## NOVEMBRO

*La 1-an : festotago de Ĉiuj Sanktuloj. La 2-an : festotago de la forpasintoj.*

*Sur la stratoj piede, sur la vojoj veture, longaj vicoj da pilgrimantoj iras al la tombejoj kun floroj por honori siajn mortintojn per preĝo aŭ enmemiĝa penso. Tio apartenas al la kulto al kadavroj iam primokita de Lanti. Mi respektas tiun kulton, sed ne partoprenas en ĝi. La korpoj de miaj gepatroj kaj de miaj kvar geavoj (kio restas el ili) kuŝas en tombejo en Aleso, je 40 km-a distanco, facile atingebla. Neniam mi iras tien. Tamen mi pensas pri ili - ne nur en la 1a aŭ 2a de novembro. Ili daŭre vivas en mia memoro kaj en mia amo.*

*Same pri miaj geonkloj kaj gekuzoj, miaj mortintaj amatinoj kaj geamikoj. Ĉiujare plilongiĝas la listo de miaj forpasintoj. Neniam mi forgesas, kvankam nenies tombon mi vizitas. Mi esperas, ke miaj gefiloj kaj genepoj same rilatos al mia memoro. Cetere, mi jam klarigis, ke mi ne havos tombon, kaj nenio restos el mia fizika estaĵo.*

## André WIERZBOLOWIEZ, komunisto

*Andreo Wierzbolowiez estis tre inteligenta kaj klera homo. Li estis la vera aŭtoro de la libro* **"Fils du Peuple"** *(Filo de l' popolo) subskribita de Maŭrico Thorez (Thorez estis bonega popola oratoro, sed ne kapabla skribe verki).*

*Mi ekkonis Andreon en la 30-aj jaroj, kiam li kaj mi loĝis en Ŝampinji-ĉe-Marno apud Parizo. Li fondis tie rondeton*

por marksismaj studoj, en kiu li, tre kompetenta kaj lerta pedagogo, simple kaj facile instruis marksismon al nekleraj laboristoj. Tiuj ĉi, interesate, sekvis akurate liajn klarigajn parolojn.

En tiu stalina epoko, nia konvinkita komunisto baldaŭ deviis de la oficiala linio de la franca komunista partio, kaj estis eksigita. Kvankam li malakordis kun la partia estraro, kaj restis firma en siaj ideoj, tiu eksigo ege ĉagrenis lin, kaj estis por li amara kaj dolora sperto.

Post mia foriĝo el la pariza regiono mi perdis lin je vido, kaj kiam min trafis informo pri lia morto, mi nenion plu sciis pri li. Sed mi konservis la memoron de tiu aŭtenta kaj fidela komunisto.

## LI HAVAS MULTE DA KLIENTOJ

*Li*, kiu ? Nu, la Dio de la Biblio, la Eternulo, la Dio de la Armeoj. Li estas elvokata sub pluraj nomoj : God, kiun preĝas la protestantaj S-ro Bush kaj S-ino Thatcher ; Alaho, pri kiu ne kredas S-ro Saddam Husejn, sed kiun li tamen vokas al sia helpo por Sankta Milito ; la sama Alaho, al kiu fidas la emiro de Kuvejto por reakiri siajn petrolŝaktojn, kaj la reĝo de Arabio por konservi siajn. Ankaŭ la sama Alaho, en kies nomo iuj Palestinanoj murdas Judojn, kaj la sama ankoraŭ, sub la nomo Jehovo, pro kiu iuj Izraelianoj buĉas Palestinanojn. Tio estas ja multe da homoj.

Sed ni estu justaj, kaj rekonu, ke la religia fanatiko ne estas monopolo de la kredantoj pri Dio unika : ĉu ne simila religia fanatiko armas tiujn hinduistojn, kiuj ĝoje masakras muzulmanojn en Hindio ?

Oni diros : la vera kaŭzo de militoj kaj ceteraj perfortaj agoj ne estas religia, sed ekonomia. Ja certe! Sed la veraj kulpuloj scias lerte uzi la religian senton de la popolaj amasoj, kaj ilian patriotan senton (kiu estas de simila inspiro) por instigi ilin al reciproka buĉado. Tial mi diras : for la religiemon! kaj for la patriotismon!

novembro 1990.

## TRI AMIKOJ

En la lasta monato mortis tri el miaj plej karaj amikoj.

**Andreo**, 69-jara, estis protestanta pastoro. Li legis la Malnovan Testamenton en la hebrea teksto kaj la Novan en la greka. Lia beltembra basa voĉo donis apartan reliefon al liaj rimarkindaj predikoj. Lia rilato al mi estis iel ambigua. Tre profunde kredanta kiel multaj Cevenanoj, li sciis min ateista, kaj neniam ektuŝis kun mi ian religian temon ; kaj li ame nomis min sia onklo, kvankam ni neniel estis parencoj. Li kaj lia edzino, mia kara "nevino" Daniela, estas modeloj de sincera kristana toleremo.

**Petro**, 76-jara, filo de iama urbestro de Ŝampinji'-ĉe-Marno, estis denaska socialisto. Ankaŭ framasono, sed ne kredanta pri la "Granda Arkitekto de l'Universo". 10-12 jarojn pli aĝa ol miaj gefiloj, li estis por ili vigla animanto de gajaj ludoj. Tiam li estis bela blondulo, altstatura, svelta, fortika, sportema. Li estis preskaŭ 60-jara, kiam li fariĝis amatora stiranto de aviadiloj kaj naviganto, kaj li faris plurajn aerajn vojaĝojn, ĝis hemiplegio kondamnis lin al rulfotelo. Sed lia menso restis klara kaj vigla, kaj lia lango ne rigidiĝis.

En 1936 ni estis kune partoprenintaj en oftaj manifestacioj de la popolfronto. Antaŭ kelkaj jaroj, perdinte mian adreson, li retrovis ĝin pere de nia komuna amiko, kdo Blondiaux, kiu ĉerpis ĝin el la SAT-adresaro. De tiam li ofte telefonis al ni, kaj unu fojon vizitis nin, veninte al Nimo en aŭto stirata de lia edzino Rajmunda. Ni ne imagis, ke lastan fojon ni vidas lin.

**Roberto**, 92-jara, estis fraŭlo longe vivinta kun siaj du pliaĝaj fratinoj. De 1925 ĝis 1935 li estis mia kolego en la firmo Pathé-Cinéma, kie li estris la kemian laboratorion.

Tre kapabla kemiisto, li estis homo de vasta ĝenerala kulturo, sprita, brila konversanto kaj atentokapta rakontanto. Epikurano, li aprecis la plezurojn de la tablo kiel tiujn de la lito, estis kompetenta pri vinoj, kaj ne malŝatis mem prepari rafinitajn manĝaĵojn, kapvestite per alta blanka ĉapo. Li diris : "Kemio estas fako de kuirarto". Sed li amis ankaŭ la artojn, precipe muzikon kaj dancon.

Li amis Hispanion, kie li havis amikojn, la hispanan respublikon, kaj en 1936-38 simpatiis kun la anarkistoj de CNT kaj FAI*. (CNT : Confederacion nacional del' Trabajo - Nacia Konfederacio de l'Laboro - FAI : Federacion anarquista iberica - Iberia anarkista Federacio).

*Roberto estis de mi konata kiel tute nekredanta. Lia patro, liberpensulo, ne baptigis lin, kaj ne donis al li ian religian edukadon.*

*Kvar jarojn antaŭ sia morto li hazarde renkontis junan katolikan monaĥinon, kun kiu li tuj eksimpatiis. Tiu inteligenta kaj klera persono entreprenis delikate, kun lerta diskreteco, konverti lin - kaj sukcesis : baldaŭ li testamente petis pri religia funebra ceremonio, kaj li mortis "kun sakramento de la Eklezio".*

## Ĉu esti aŭ ne esti, jen estas la demando

***Nia** subtila Jakelino kaptis min en reto. Ŝi malpermesas al mi paroli pri Dio, ĉar "laŭ mi ne ekzistas iu dio", kaj "oni ne parolu pri io aŭ iu neekzistanta". Sed, fulmotondro! mi ja parolas pri io tre ekzistanta - en la imago de de la dikredantoj; kaj mi provas klarigi, ke kaj kial, laŭ mi, ilia kredo estas iluzia. Mi substrekas : laŭ mi, ĉar male al la granda plimulto el la religianoj, mi ne pretendas posedi LA VERON. Laŭ mi ekzistas nur relativaj veretoj, kaj ne unu Vero, unika kaj absoluta. Ĉu tio estas filozofi aŭ filozofumi?*

*Ergoto de Bonaero en sia "**ergoto de Ergoto**", p.55, diras, ke mi filozofas. Do laŭ li mi estus (aŭ kredus esti) filozofo? Kial ne saĝulo, dum li tiel alte taksas min? Ne, nek saĝulo nek filozofo mi estas, Dio gardu! Filozofoj estas grandaj kleruloj, kiuj lerte konstruas belegajn sistemojn por klarigi la mondon. Mi admiras, kaj ne komprenas ilin. Mi estas nur simplulo, kiu strebas simple, sobre, kiel eble prudente rezonadi. Al tio sufiĉas mia ambicio.*

*Jakelino diras ankaŭ, ke por valide diskuti pri ekzisto aŭ neekzisto de Dio, necesus unue interkonsenti pri difino de la vortoj Dio kaj ekzisto. Mi konfesas mian nekapablon pri precizaj difinoj. Mi prenas la vortojn en la senco kutime akceptata de la granda plimulto el la homoj. Ke tiu senco estas konfuza, nebula, mi ne kontestas - sed ne estas mia kulpo. Mi jam avertis : mi estas simplulo. Do bonvolu ne ĉikani min pri subtilaĵoj.*

**VALO**



Nia felietono :

# FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO
de Petro USPENSKO (OUSPENSKY)
(resumpecoj)

7

(El la 9ª ĉapitro)

## LA 3 OKTAVOJ DE RADIADOJ KAJ LA TABELO DE HIDROGENOJ

### LA 3 OKTAVOJ DE RADIADOJ

| | | |
|---|---|---|
| | DO | |
| intervalo | -- | ABSOLUTO |
| (1ª) | SI | |
| | LA | |
| | SOL | |
| | FA | |
| INTERVALO | -- | 1ª ŝoko |
| | MI | (nekonata |
| | RE | por ni) |
| | DO | |
| intervalo | -- | SUNO |
| (2ª) | SI | |
| | LA | |
| | SOL | |
| | FA | |
| INTERVALO | -- | 2ª ŝoko |
| | MI | (Organika |
| | RE | vivo) |
| | DO | |
| intervalo | -- | TERO |
| (3ª) | SI | |
| | LA | |
| | SOL | |
| | FA | |
| INTERVALO | -- | 3ª ŝoko |
| | MI | (nekonata |
| | RE | por ni) |
| | DO | LUNO |

La agado de l'Absoluto super la mondoj daŭrigas,nome super ĉiuj mondoj,k la agado de ĉiu el ĉi tiuj mondoj manifestiĝas super la sekvaj mondoj. Ĉiuj sunoj de la Lakta Vojo influas super nia Suno. Nia Suno influas super la planedoj. Ĉiuj planedoj influas super nia Tero,k la Tero,super la Luno. Ĉi tiuj influoj estas transsendataj pere de radiadoj, tra la interstelaj k interplanedaj spacoj.

Kun la celo studi ĉi tiujn radiadojn, ni konsideru la "Radion de Kreado" en formo mallongigita: ABSOLUTO-SUNO-TERO-LUNO, aŭ pli precize, ni konsideru ĝin en la formo de 3 OKTAVOJ DE RADIADO: La 1ª oktavo inter la Absoluto k la Suno, la 2ª inter la Suno k la Tero,kaj la 3ª inter la Tero k la Luno.

Ĉi tiuj 3 oktavoj de radiadoj (formo per kiu ni nun reprezentas la universon) permesos al ni ekspliki la rilaton de la materioj kaj fortoj de malsamaj planoj de la mondo, kun nia propra vivo. Kvankam estas 6 intervaloj (en ĉi tiuj 3 oktavoj),nur 3 bezonas esti plenigitaj el-ekstere.

La 1-an intervalon plenigas la volo del'Absoluto; la

2ªn (DO-SI)plenigas la influo de l'sun-maso sur la radiadoj kiuj trairas ĝin; la 3ªan (DO-SI)plenigas la agado de la Ter-maso sur la radiadoj kiuj trairas ĝin.

Nur la intervaloj inter FA k MI devas esti plenigitaj per "aldonaj ŝokoj";ĉi tiuj "aldonaj ŝokoj" povas veni jen el aliaj oktavoj kiuj trairas la menciitan punkton aŭ el paralelaj oktavoj kiuj eliras el supraj punktoj.

Ni ekzamenu nun la 1-an el ĉi tiuj 3 oktavoj de radiadoj(Absoluto-Suno)laŭ la vidpunkto de la leĝo de 3, ni vidos ke la noto DO estos la kondukanto de la aktiva forto (Nº 1),k la materio,en kiu ĉi tiu forto agas, estos Karbono (C); ĉi tiu aktiva forto reprezentas la maksimuman frekvencon de vibradoj;k la materio(kondukanta ĉi forton), nome, la materio en kiu plenumiĝas ĉi tiuj vibradoj, tio estas, la 1ª karbono,reprezentas la minimuman densecon de materio.

La noto SI estos la kondukanto de l' pasiva forto (Nº 2), k la materio kondukanta ĉi tiun forton estos Oksigeno (O). La noto LA estos la kondukanto de l'neŭtraliga forto Nº 3, k la materio kondukanta ĉi tiun forton estos Nitrogeno (N).

Laŭ la ordo de agado, ĉi tiuj fortoj konserviĝos en la ordo de sinsekvo 1,2,3, nome,ili respondos la materiojn "Karbono, "Oksigeno", "Nitrogeno". Sed laŭ la denseco de sia materio, ili restos en la ordo:Karbono, Nitrogeno, Oksigeno, nome: 1,3,2, ĉar kvankam la Nitrogeno konservas la Nºn 3(ĉar ĝi kondukas la neŭtraligan forton), ĝi restas pro sia denseco de materio inter la Karbono k la Oksigeno, aperanta ĉi lasta kiel la plej densa el la tri. (Tial ke aktiva forto aganta sur pasiva forto estigas mezan forton, kiu lokiĝas inter la 1ª k la 2ª.)

La Karbono, la Oksigeno k la Nitrogeno kune estigos materion de la 4ª ordo aŭ Hidrogeno (H), kies densecon ni indikos per la Nº 6 (kiel la sumo de 1,2,3,nome:H6.

1ª TRIOPO

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 1ª AKTIVA forto | DO | (C) 1 | 1 (C1) | H6 |
| 2ª PASIVA forto | SI | (0) 2 | 3 (N2) | |
| 3ª NEŬTRALIGA forto | LA | (N) 3 | 2 (03) | |

Estante pli aktiva ol la Oksigeno,la Nitrogeno(de la 1ª triopo) eniras en la 2-an triopon kiel aktiva principo,k ĝi eniras tien kun la denseco 2,nome,kiel Karbono kun la denseco 2. (Vidu la tabelon aŭ diagramon)

2ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| LA | (C)2 | 2(C2) | H 12 |
| SOL | (0)4 | 6(N4) | |
| FA | (N)6 | 4(06) | |

3ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| FA | (C)4 | 4(C4) | H 24 |
| — | (0)8 | 12(N8) | |
| MI | (N)12 | 8(012) | |

4ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| MI | (C) 8 | 8 | H 48 |
| RE | (0) 16 | 24 | |
| DO | (N) 24 | 16 | |

5ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| DO | (C) 16 | 16 | H 96 |
| SI | (0) 32 | 48 | |
| LA | (N) 48 | 32 | |

6ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| LA | (C) 32 | 32 | H 196 |
| SOL | (0) 64 | 96 | |
| FA | (N) 96 | 64 | |

7ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| FA | (C) 64 | 64 | H 384 |
| — | (0)128 | 192 | |
| MI | (N)192 | 128 | |

8ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| MI | (C)128 | 128 | H 768 |
| RE | (0)256 | 384 | |
| DO | (N)384 | 256 | |

9ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| DO | (C)256 | 256 | H1526 |
| SI | (0)512 | 768 | |
| LA | (N)768 | 512 | |

10ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| LA | (C) 512 | 512 | H 3070 |
| SOL | (0)1024 | 1536 | |
| FA | (N)1536 | 1024 | |

11ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| FA | (C)1024 | 1024 | H 6144 |
| — | (0)2048 | 3072 | |
| MI | (N)3072 | 2048 | |

12ª TRIOPO

| | | | |
|---|---|---|---|
| MI | (C)2048 | 2048 | H 12288 |
| RE | (0)4096 | 6144 | |
| DO | (N)6144 | 4096 | |

La noto LA de la 1ª triopo estos la kondukanto de la aktiva forto en la sekva triopo en kiun ĝi eniros kun la denseco 2. Se la nova Karbono eniras kun la denseco 2,la Oksigeno k la Nitrogeno devas respondi al ĝi en siaj densecoj, reproduktante la proporcion de densecoj de la 1ª triopo. En la 1ª triopo la rilato de densecoj estas:1, 2, 3; en la 2ª triopo ĝi estos:2,4, 6; kaj kune ili estigos la Hidrogenon 12 (H 12).

Laŭ la sama skemo,la 3ª triopo konsistos el: FA,ŝoko,MI. La Nitrogeno de la 2ª triopo eniros en la 3ªn kiel Karbono kun la denseco 4.La Nitrogeno k la Oksigeno, kiuj respondas al ĝi, devos havi la densecojn 8 k 12;kune ili estigos la Hidrogenon 24(H 24).(KTP)

Tiel oni ekhavas 12 "Hidrogenojn" kun densecoj gradigitaj de 6 al 12288. Ĉi tiuj

12 Hidrogenoj reprezentas 12 materiajn kategoriojn,kiuj gradiĝas en la universo ekde la Absoluto ĝis la Luno, k se estus eble establi kun ekzakteco kiu el ĉi tiuj hidrogenoj konsistigas la homan organismon kaj agas en ĝi, nur ĉi tio determinus la lokon kiun la homo okupas en la mondo. Sed en la loko kie ni situas, interne de la limoj de niaj povoj k ordinaraj kapabloj, la hidrogeno 6 estas nereduktebla; tial ni rajtas preni ĝin kiel hidrogenon 1; la sekvan hidrogenon ni rajtas konsideri kiel H 6. Se ni dividas per 2 ĉiujn hidrogenojn, kiuj sekvas, ni ekhavas skalon kiu iras de l' H 1 al H 6144. Tamen, la H 6 (de ĉi tiu alia skalo) estas ankoraŭ nereduktebla por ni.Tial ni prenas ĝin denove kiel H 1, la sekvan kiel H 6, k ni ree dividas per 2 ĉiujn sekvantajn. La gradoj tiel atingitaj ekde 1 ĝis 3072, povas taŭgi por la homa studado.

Ĉiuj materioj ekde H 6 ĝis H 3072 troviĝas en la homa organismo, k tie ĉiuj plenumas sian rolon.Ĉiu el ĉi tiuj hidrogenoj grupigas grandan nombron de konataj substancoj ĥemiaj,ligitaj de iu funkcio rilatanta nian organismon.

La termino HIDROGENO havas ampleksan sencon. Ĉiu simpla elemento estas H de iu denseco; krome kiu ajn kombino de elementoj, posedantaj determinitan funkcion,ĉu en la universo aŭ en homa organismo, estas ankaŭ H.

Tia difino de materioj permesas al ni klasi ilin en la ordo de ilia rilato kun la vivo kaj la funkcioj de nia organismo.

Ni komencu per H 768. Oni difinas ĝin kiel MANĜAĴO, nome, ĉiuj substancoj kiuj povas taŭgi kiel manĝaĵo al la homo. La substancoj kiuj ne povas taŭgi al li kiel manĝaĵo, ekzemple, lignopeco, apartenas al H 1536;peco da fero al H 3072. Materio malriĉa je nutraj elementoj estos proksime al H 384,kiun oni rajtas difini kiel AKVO. H 192 estas la AERO kiun ni spiras. H 96 estas reprezentata de maldensaj gasoj, nespireblaj de homo, sed kiuj ludas gravan rolon en lia vivo; krome ĉi tiu estas la materio de l'besta magnetismo, de emanaĵoj de la homa korpo, de X(ikso)-radioj, de hormonoj, vitaminoj, kotopo,ktp.; per H 96 finiĝas tio nomata materio, nome, tio kion la ordinaraj fiziko k ĥemio konsideras materio. H 96 inkludas ankaŭ materiojn preskaŭ nepercepteblajn,aŭ percepteblajn nur pro ĝiaj spuroj aŭ ĝiaj efikoj,kies ekziston supozas iuj teoriuloj kaj neas



aliuloj.

H 48, 24, 12 k 6 estas materioj nekonataj por la nuntempaj fizikistoj kaj ĥemiistoj. Ĉi tiuj estas la materioj de nia psika k spirita vivo en malsamaj gradoj.

TABELO DE HIDROGENOJ POR LA STUDADO PRI LA HOMO

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| DO SI LA | H 6 | H 1 | | |
| LA SOL FA | H 12 | H 6 | H 1 | |
| FA — MI | H 24 | H 12 | H 6 | Materioj nekonataj por la fizikistoj k ĥemiistoj.Ili estas la materioj de nia psika kaj spirita vivo en malsamaj gradoj. (H 6 – H 48) |
| MI RE DO | H 48 | H 24 | H 12 | |
| DO SI LA | H 96 | H 48 | H 24 | |
| LA SOL FA | H 192 | H 96 | H 48 | |
| FA — MI | H 384 | H 192 | H 96 | Nespireblaj gasoj, animala (*)magnetismo, emanaĵoj de la homa korpo,hormonoj,vitaminoj,ktp. |
| MI RE DO | H 768 | H 384 | H 192 | ←AERO |
| DO SI LA | H 1536 | H 768 | H 384 | ←AKVO |
| LA SOL FA | H 3072 | H 1536 | H 768 | ←MANĜAĴO por la homo. |
| FA — MI | H 6144 | H 3072 | H 1536 | ←ligno |
| MI RE DO | H12288 | H 6144 | H 3072 | ←fero |

(*) ANIMALA: besta aŭ homa.

Studante la TABELOn DE HIDROGENOJ, oni devas memori ĉiam ke ĉiu hidrogeno ampleksas grandan nombron de malsamaj substancoj konektitaj inter si per unu sola k sama funkcio de nia organismo, k ke ili reprezentas difinitan, kosman grupon.

La speciala ĥemio, kiun ni uzas, studas la materion sur bazo malsama de la ordinara ĥemio, ĉar ĝi konsideras ne nur ĝiajn ĤEMIAJN KAJ FIZIKAJN KVALITOJN,sed ankaŭ ĝiajn PSIKAJN KAJ KOSMAJN KVALITOJN.

Ĉi tiu ĥemio aŭ alĥemio,antaŭ ĉio,konsideras la materion el la vidpunkto de ĝiaj FUNKCIOJ (kiuj determinas

ĝian lokon en la universo k ĝian rilaton kun la aliaj materioj),k poste,el la vidpunkto de ĝia rilato kun la homo kaj la homaj funkcioj.

Oni komprenas per ATOMO DE SUBSTANCO: la plej eta kvanto de donita substanco,kiu retenas ĉiujn siajn kvalitojn fizikajn,ĥemiajn,kosmajn kaj psikajn (kvalitojn psikajn,nome, iun kvanton da inteligento). Ekz.: atomo da akvo (la plej eta kvanto da akvo, kiu retenas ĉiujn kvalitojn de la akvo);atomo da aero,da pano,da viando, kotopo.

La TABELO DE HIDROGENOJ faras ebla la studadon de ĉiuj substancoj, kiuj konsistigas la homan organismon el la vidpunkto de ĝia rilato kun la malsamaj planoj de l' universo.

***

En ĉio,kion ni faras,ni estas limigitaj de la kvanto da energio produktata de nia organismo.Ĉiu funkcio,ĉiu stato, ĉiu ago, ĉiu penso,ĉiu sento postulas energion, tre precizan substancon.

Tial, kun la celo ke la (psikologia!) laboro pri si estu laboro utila, oni devas lerni ŝpari la energion. La energio eluziĝas precipe en senutilaj k malagrablaj emocioj,en la atendado angora de okazaĵoj malagrablaj (eblaj aŭ neeblaj),en malbona humoro, en senutilaj hastoj, nervozeco, koleriĝo, senkontrola imagemo, revado, kotopo, kotopo, ktp!

La energio misuziĝas en la laboro erara de la centroj, en la senutila streĉado de muskoloj, en la sencela babilado, en la atento dediĉita al aferoj negravaj, kiuj okazas ĉirkaŭ ni, aŭ al la personoj kun kiuj ni havas nenion por fari, kaj kiuj eĉ rigardon ne meritas, kotopo,kotopo, ktp.

Ekbatalante kontraŭ ĉi tiuj kutimoj, homo ŝparas ja grandegan kvanton da energio, kaj helpate de ĉi tiu energio, li povas facile komenci la laboron de studado kaj perfektigado pri si.

Resume kompilis: ERGOTO DE BONAERO

*********************************************************



O.P. :

## KELKAJ PRIPENSAĴOJ PRI EKONOMIO KAJ EKONOMIAJ DOKTRINOJ

*Nun oni multe parolas pri ekonomio.*

*En la politikaj debatoj la politikaĉuloj riproĉas unuj la aliajn: "Vi ne parolas pri la ĉefa problemo (la senlaboreco)".*

*Rimarkiginde estas, ke iliaj programoj malmulte diferencas, vere neniu prezentas bonan solvon.*

*En la laboristaj partioj la reformistoj celas nur kelkajn bonfarojn por la malfavoratoj, kaj la revoluciuloj plu estas tiaj nur laŭ la ŝildo; ili parolas pri klasbatalo kiel propagandrimedo kaj por akiri pli da potenco. Vere la socialismo havas malfavoran bildon, pro tio okazinta en Sovetio kaj en landoj, kiuj poste travivis iom similajn eksperimentojn. PLie, la vivkondiĉoj en la kapitalismaj landoj estas bonaj. Ĉu necesas ion ŝanĝi?*

*La kapitalisma sistemo progresigis sciencojn kaj teknikojn ĝis tiom grandaj atingaĵoj, ke oni povas abunde produkti por kontentigi ĉiujn esencajn bezonaĵojn. Okazas krizo apud granda akumulado de riĉaĵoj. Oni forpelas grandan popoltavolon en mizeron kaj malcertecon. La marksistoj antaŭvidis en la klasbatalo faktoron, kiu kondukos per povopreno de la laborista klaso, al pli justa, pli egaleca sistemo (socialismo aŭ komunismo). Mi opinias, ke oni devas iomete ŝanĝi tiun vidpunkton. La laborista batalo estis kaj plu estas necesa por plibonigi la vivtenon de la laboristoj, sed ne fatale kondukas al pli justa sistemo. Ofte ĝi estas okazigata de iu kategorio, iu korporacio, kiuj estas jam favorataj kompare al la bazo. Tiel pliampleksiĝas la diferencoj ene de tiu klaso. La superaj tavoloj konscias, ke ili akiros malmulte, se okazos ŝanĝo de sistemo. Ili tendencas agi nur por ankoraŭ plibonigi sian vivtenon. Mi opinias, ke oni povas ilin konsideri kiel novan mezan klason, kiu pli-*

fortigas la malnovan. Por ili ne plu temas pri klas-batalo. Eĉ por la mezaj laboristaj kategorioj la normala vivteno bone progresis, ne plu eblas paroli pri proletoj tute senhavaj.

La laŭdire "socialismaj sistemoj" demonstris la malfacilecon starigi novan ekonomian sistemon kaj konsekvence ne montras logecon. Mi tamen opinias, ke la kapitalismo ne estas perfektebla, ke ĝiaj malsanoj povas nur graviĝi. Do necesas trovi bonan solvon.

Kiam mi estis juna proleto, mi esperis socialismon, ankaŭ eblan evoluon laŭ marksaj prognozoj. Plu daŭre mi opinias, ke la dezirinda evoluo estas en direkto al iu komunisma sistemo, al socio, en kiu ĉiu ricevos laŭ siaj bezonoj, kaj partoprenos al la produktado laŭ sia kapablo. La malfacilo estas kiamaniere atingi tiun celon, kiel eblos ĝia funkciado?

Mi opinias necesa diri kiel oni antaŭvidas ĝian funkciadon, tiel ke ĝi ne fariĝu fonto de novaj maljustaĵoj, ankaŭ ke ĝi certigu bonan ekonomian funkciadon, bonstatan kaj sekuran vivon. Necesas do prezenti facile kompreneblan projekton, kiu ŝajnos vere efektivigebla al ĉiuj. Ĉu eblas esperi pri la klas-batalo? Ofte ĝi estas nur egoismaj aspiroj al ĉiam pli, sed ne fatale kondukas al batalo por nova soci-ordo pli justa , pli egaleca.

Subtenante la batalon de malfavorataj kategorioj aŭ forĵetitoj, ni devas prezenti nian socialisman projekton kaj komprenigi al ili la neceson de ŝanĝo, kiu estus bona por la tuta socio. Ankaŭ atentigi ĉiujn civitanojn pri tiuj problemoj. Komprenigi al ili ke ne sufiĉas pensi pri propra tuja materia intereso sed ankaŭ pri tiu de la socio entute. Ĉies interesoj estus pli certigataj en socio, kiu dispartigos la enspezojn laŭ maniero pli justa, pli egaleca.

Pluraj pensuloj, kiel Edward BELLAMY, Major G.H. DOUGLAS, Jacques DUBOIN, elpensis solvojn, kiuj celis novajn ekonomiajn bazojn, permesantajn pli bone profiti de la sciencaj kaj teknikaj akiraĵoj por certigi al ĉiuj bonan vivostaton. Inspiriĝante el tiuj pensuloj kaj ankaŭ el Marks kaj Engels kaj aliaj ekonomikistoj, mi prezentas mian vidpunkton kaj proponojn.



O.P. :

## LA DISDONA EKONOMIO
## LA EKONOMIAJ DOKTRINOJ
## KIEL PROGRESADI?

Mi tre aprecas la verkon de J. DUBOIN (Dübùen') kaj ankaŭ la de li proponitan solvon. Li eligis el la nuna ekonomia stato bonajn konkludojn. La solvo proponita estas radikala ŝanĝo de ekonomia sistemo. Lia propono estis trafa, mi opinias, sed neefektivigebla sub tiu formo. Li ne bone montris kiamaniere oni povus atingi sukceson. Ĉefe estus tre malsimple kalkuli la necesan konsummonon. Kiamaniere taksi ĉiujn produktaĵojn, organizi la socian servon : ĉu devige, kiom daŭre, kiel kontroli ?

Do ŝajnas, ke laŭ tiaj principoj necesas elekti pli facile efektivigeblan proponon. Ankaŭ, ke la samopiniantoj politike sin organizu aparte, ke ili propagandu, agadu ĉefe ĉe la malstabilaj, senlaboraj homoj, ĉe la laboristaj sindikatoj, ĉe ĉiuj kleruloj aŭ socialaj klerulaj organizoj. Por ni laboristoj-esperantistoj, en niaj esperantaj rondoj.

Ĉu en la ekonomikaj doktrinoj oni trovas pripensigajn opiniojn?

* *
*

Ŝajnas, ke aparte en la 18a jarcento oni pritraktis ekonomion. En Francio la filozofoj pri naturaj rajtoj konceptis la socialajn evoluojn determinataj per evoluo de la socio. La fiziokratoj (QUESNAY) aplikis tiun tendencon al studado de ekonomiaj faktoj.

Ilia baza ideo estas divido de la socio en tri klasoj: la produktiva klaso (la agrokulturistoj), la sterila klaso (industriistoj, komercistoj), la dunge pagita klaso. Laŭ teorio de la neta produktaĵaro, la nura fonto el riĉo estas la unua klaso. El ĝi eliras la cirkulanta movado distribuanta la riĉaĵon en la socio. Laŭ mi, tiu teorio estis tre bona. Ĉu nun ne eblus sammaniere kalkuli ekzemple la nacian enspezon kiel sumon de la varoj produktitaj de ĉiuj kiuj laboras en produktado de materiaj varoj aŭ energio? Ĉar oni interŝanĝas tiujn produktaĵojn, oni bezonas taksi la valoron de ĉiu produkto vara aŭ energia. Oni povas ĝin ankaŭ interŝanĝi kontraŭ servoj. Sed kiel taksi la valoron de tiuj produktaĵoj?

Ŝajnas, ke la plej ĝusta valoro estas laŭ la Marks-a difino : la kvanto de labortempo aŭ de produktita mekanika energio kristaliĝinta en ĝi. Por la servoj oni povos difini kiel Marks difinis la salajron : "La salajro estas tio, kion pagas la kapitalisto al la laboristo por aĉeti la necesaĵon por lin vivteni, ne kalkulante la valoron produktitan." Marks volis demonstri la ekspluatadon de la laboristoj. Li prognozis, ke ĉiam la kapitalistoj donos minimuman salajron. Pri tio li iom eraris. Nun la socialaj asekuroj aŭ publika asistado disdonas enspezon al aliaj sociaj kategorioj.

Tiel parto de la loĝantaro produktas ĉion necesan por la tuta loĝantaro, alidire la veran riĉaĵon. Por tiu interŝanĝo oni uzas monon. Nun la valoro de monunuo dependas de nura fido, ĝi estas tute arbitra. Ĉu ne estus pli bone ĝin rilatigi al parto de la produktita valoro? La sumo de jare produktita valoro en iu regno estus la sumo de labortempo de ĉiuj, kiuj laboras en la fakoj produktantaj interŝanĝajn varojn kaj energion. Al la fiziokrataj agrokulturistoj oni povos aldoni industriajn aŭ metiistajn laboristojn-mastrojn, kiuj estas ankaŭ helpantoj de tiuj fakoj. Por simpligi, oni povus kalkuli la sumon de labortempo necesa por produkti la bezonojn de la koncerna kolektivo (nacio, federacio...), taksante por ĉiu la meznombran labortempon egalan al leĝa labortempo en tiu periodo. Tiun meznombran labortempon oni obligos per la nombro da laborantoj en tiuj produktivaj fakoj. Tio donos



en laborhoroj la tutan produktitan valoron de la utilaj bezonaĵoj (varo aŭ energio). Por difini la valoron de monunuo sufiĉus dependigi ĝin kiel centonon de unu horo da laboro.

Pli poste ni parolos pri la mono. Mi volas citi iom similan analizon de aŭstralia ekonomikisto Colin CLARK, kiun citas J. DUBOIN en la broŝuro **"Les Yeux Ouverts"** (La Malfermitaj Okuloj) : "Colin CLARK klasas ekonomion en tri sektorojn : la unua konsistas el agrokulturistoj kaj ĉiuj krudaj materioj; la dua, el ĉiuj industriaj formoj; la tria arigas funkciulojn, militistojn, komercistojn, liberajn profesiulojn. Nur la unua kaj dua produktas verajn riĉaĵojn; nur ili disdonas monon al la loĝantaro (almenaŭ nur ilia laboro certigas valoron al la mono - O.P.)
La konsumantoj el la unua kaj dua sektoroj ricevas sian aĉetpovon per salajroj aŭ profitoj. La konsumantoj el la tria malrekte ricevas ĝin, ĉar ĝi estas transdonata de la jam posedantaj konsumantoj, kiuj postulas servojn de tiu tria.
La ŝtato antaŭe deprenas siajn bezonaĵojn de ĉiuj posedantoj por pagi servojn, sed ankaŭ por doni enspezojn al ĉiuj pensiuloj, malsanuloj, ĉiuj subvenciataj kategorioj."

Ankaŭ en la broŝuro **"Maŝinoj, mono kaj mondpaco"** la britaj socikreditanoj faras iom similan analizon. Pri difino de vera riĉo, paĝo 38, paragrafo 31 : "La valoro de mono dependas de popola kapablo kaj preteco liveri varojn aŭ servojn interŝanĝe por ĝi. Sed la kapablo liveri varojn aŭ servojn (ĉu ili estas bezonataj aŭ ne) ne estas en si mem taŭga bazo por la reguligo de la monprovizo. La Reala Riĉo de komunumo kuŝas en ties kapablo liveri varojn kaj servojn kiam, kien kaj kiel ili estas bezonataj. Ĉi tiu Reala Riĉo estas la sola taŭga bazo por la komuna monprovizo. Ĉiu plivastigo de Reala Riĉo devus esti akompanata aŭtomate de rilata pligrandiĝo de la monprovizo encirkuligata, tiel ke ĝi ebligos al la popolo aĉeti pli multe."

Ŝajnas, ke la socikreditanoj konsideras Reala Riĉo la laborkapablon de iu popolo. Laŭ mi, konvenas apartigi laboron por produkti varojn aŭ energion disde la laboro por

la servoj. Nur la unua produktas ĉion nepre necesan por la vivo aŭ por la produktaj aŭ interŝanĝaj rimedoj. Tiu unua kategorio konsumas parton el siaj produktaĵoj kaj per la alia parto pagas la servojn aŭ socialajn asekurojn. Kiel mi diris, oni devus rilatigi la monprovizon al la valoro de la produktita -ata, -ota varo, kiu estos interŝanĝata dum difinita tempo. Ĉu, kiel diras la socikreditanoj, oni povas aŭtomate akompani plivastiĝon de Reala Riĉo per rilata pligrandiĝo de la popola aĉetpovo? Mi opinias, ke la ebleco devus tamen esti ĉiam pli bremsata per la neceso protekti naturon, ŝpari elĉerpeblajn riĉofontojn. Eĉ se la grandaj sciencaj kaj teknologiaj konoj ebligas produkti grandkvante, ĉu ne estus stulte produkti frivolaĵojn aŭ tuj elĵeteblajn gaĝetojn? Ni devas saĝe uzi la naturajn riĉofontojn.

Mi same opinias kiel la socikreditanoj, ke: "Mono ankoraŭ estas la plej bona rimedo el tiuj eltrovitaj, por distribui varojn kaj servojn al homoj laŭ iliaj elektoj. Tiel estas necese konsideri la plej bonan metodon por meti la ĝustan sumon de aĉetpovo en la poŝojn de la popolo." Sed la unua afero estas difini valoron de la mono. Kiel mi jam diris, ŝajnas ke oni povas rilatigi ĝin kun X centonoj de interŝanĝa valoro produktita en unu horo da laboro.

Ĉiu elektas manieron elspezi sian aĉetpovon: aŭ li tuj konsumas ĝin, aŭ ĝi ŝparas por aĉeti artiklojn, kies akiro postulus en unu fojo tro grandan parton de la jara porcio. Por eviti grandan mon-akumuladon ĉe individuo, ŝajnus bone, ke oni regule kaj konstante malpliigu la valoron de la monunuo. Ekzemple, oni emisios ĉiun trian monaton pli da monunuoj kaj plialtigos la prezojn kaj enspezojn je 1 procento. Tamen eblos deponi ŝparaĵojn en ŝparkaso aŭ banko, sed kiuj donos interezon de nur duono de la devaluto. Male, se ŝparkaso aŭ banko donos krediton, ili postulos interezon egalan al la devaluto. Kiam la devaluto atingos 50 procentojn, eblos doni novan monunuon, kiu valoros duoblon de la malnova. Dum kelka tempo eblos pagi saman artiklon per nova monunuo aŭ 2 malnovaj monunuoj. Se individuo deponos monon en ŝparkaso, li malpli perdos ol se li konservos ĝin hejme, tio faciligos cirkuladon de la monon, ankaŭ disponigos ĝin al aliaj privatuloj aŭ kolektivo monsumon por grandaj efektivigoj. La malgranda interezo al privatuloj malpliigos la devaluton kaj instigos ne konservi hejme grandan monsumon. La rolo de la mondeponejoj estas kunigi, sumigi la individuajn ŝparaĵojn; la pli granda interezo estas por pagi ilian servon.

Resume : Mi proponas 1.Plu uzi monon por la interŝanĝoj kaj ŝparado, sed rilatigi la monunuon al interŝanĝa valoro de varoj produktitaj per unu horo da laboro (X centonoj el tiu interŝanĝa valoro). 2. Ke tiu monvaloro estu konstante kaj regule malpliigata. 3. Ke tamen la ŝparita mono, kiun oni disponigas, deponante ĝin en ŝparkaso, donu malgrandan interezon (duonon de devaluto) kaj ke la prunteprenoj trudu doni interezon (egalan al la devaluto).

En la 37a ĉapitro de la broŝuro **Maŝinoj, mono kaj mondpaco** estas dirite: "La monprovizo devos esti regulata laŭ iu aŭtomata, scienca principo; tial estas tre urĝe certigi, ke tiu aŭtomata principo estu ĝuota." Mi vidas tiun eblecon laŭ tio, kion mi jam proponis, sed por la kvanto de cirkuligata mono necesas ankaŭ kalkuli kiom oni bezonas dum iu difinita tempo. La Soci-Kreditanoj proponas: "La kalkulo de la monsumo de tempo al tempo bezonata estas teknika afero. Por tio nacia aŭtoritato devas esti establita por kolekti kaj kompari la necesajn informojn, inkluzive la pligrandiĝon de la povo de la popolo kolektive liveri la varojn kaj servojn, kiujn ili individue bezonas.

Ĉi tiu Nacia Kredita Departemento devos esti sendependa aro de spertuloj tute liberaj de politika influo aŭ rego". Ŝajnas, ke tiu vidpunkto estas bona, sed laŭ mi oni ne devus inkludi servojn kun varoj, temas nur pri disdonado de varoj. Ankaŭ tiu disdonado devos kalkuli parton por la kolektivaj same kiel por la individuaj bezonoj. Ekzemple, konante la kvanton bezonatan por unu monato, necesus kalkuli kiom da labortempo necesas por ĝin produkti. Sciante la rilaton de monunuo al unu horo da la-

boro, oni povus kalkuli la sumon necesan por interŝanĝi tiujn produktitajn varojn. Poste temas pri disdonado de parto de tiu sumo al konsumantoj.

Kiel fari tiun disdonadon? Kiel ĝi okazas nun? Teorie nun la produktantoj de varoj vendas ilin laŭ iliaj valoroj, sed laŭ la merkata leĝo tiu prezo estas jen malpli, jen pli alta ol la kosto de la produktado. Sed, kiel bone montris MARKS, tiu prezo havas tendencon egaliĝi al la meza kosto de la produktado (kvanto da labortempo kiun ĝi enhavas). Tiuj produktistoj estas aŭ rektaj produktistoj kaj vendistoj, aŭ mastroj de potencaj industrioj. La rektaj produktistoj uzas parton de sia enspezo por pagi ĉiujn servojn, asekurojn, instituciajn kontribuojn necesajn por la socia vivo. Fakte la mastroj, dungistoj, pagas unue al siaj laboristoj kvazaŭan servon, kaj ankaŭ kiel la aliaj produktistoj, por la servoj, asekuroj, kontribuoj. Sed la valoro de la produktaĵoj estas pli granda ol la elspezoj necesaj por ilin produkti. La plusvaloro fariĝas posedaĵo de la kapitalisto, kiu ĝin elspezas aŭ ne. Se li esperas akiri pli da profito, li povos investi, kio stimulos la aktiveco, sed se regas abundeco, li ne investos, ĉar kiam regas abundeco la prezoj tendencas malplialtiĝi, do ankaŭ la profitoj. Ju pli kreskas la produktiveco, des pli grandkvante oni produktas per malpli da laboristoj. La mastroj maldungas laboristojn, tiuj ricevas malgrandan kompenson aŭ nenion, do, ne disponante aĉetpovon, ili konsumas malpli. Por la laborantoj en servoj aŭ la liberalaj profesioj, ilian enspezon oni povas kalkuli same kiel por la laboristoj : ĝi estas prezo de ilia vivteno. Certe estas grandaj diferencoj, tamen oni povas ĝin konsideri sama kiel tiu de la laboristoj. Oni ankaŭ disdonas monhelpon al ĉiuj sociaj kategorioj, kiuj ial ne laboras.

1. Nur unu socia kategorio produktas la materiajn riĉaĵojn.
2. Oni utiligas parton por prizorgi la bienojn, ekipaĵaron, produktrimedojn aŭ ilin renovigi, anstataŭigi la eluzitajn. Oni dispartigas la ceteron al la tuta popolo.
3. Tiu dispartigo estas tute malegala. Ni povas diri ekz-e ke parto de la kolektivo produktas ĉion necesan por ĝi, dum alia parto plenumas ĉiujn necesajn servojn. La cetero konsistigas naturan elementon de ĉiu socio.

Ĉiu produktanto konsumas parton el siaj produktitaĵoj kaj interŝanĝas alian parton kontraŭ aĵoj produktitaj de aliaj produktantoj. Por esti justa tiu interŝanĝo devus okazi laŭ valoro kontraŭ ekvivalento. Sed oni interŝanĝas ankaŭ parton kontraŭ servoj; por tiuj servoj la servodonantoj ricevas parton de produktaĵoj. Oni disdonas ankaŭ parton por la sociaj bezonoj. La kapitalposedantoj, kiuj alproprigas al si parton de la produktitaj riĉaĵoj, ricevas la plej grandan parton el kiu ili grandparte ŝparas, tiel ĉiam pliriĉiĝante. Parto utilas por perfektigi, modernigi la produktorimedojn, kaj tiel produkti per malpli da laboristoj. Tiel ĉiam kreskadas la nombro de tiuj, por kiuj malpliiĝas la aĉetpovo. Do, apud abunda produktado estas mizero. Por eliri el tiu stulta situacio, necesas nova disdona sistemo.

Mi opinias, ke plu oni uzu la monon, sed laŭ la maniero, kiun mi proponis. Koncerne la produktadon, ŝajnas ke la familiaj entreprenoj (agrokulturo, metiistoj, etentreprenistoj, etkomercistoj) plu estu samtempe proprietuloj kaj laboristoj, kaj ricevu enspezon, vendante siajn produktaĵojn. Parto de tiu enspezo utilu por pagi servojn kaj sociajn kontribuojn. Fakte plu daŭru la merkata ekonomio, sed kun regularo, kiu ebligu por normala labortempo ricevi enspezon egalan al la ĝenerala meza enspezo. La grandaj entreprenoj, uzinoj, industrioj, bankoj fariĝu proprumo de la kolektivo. La mastrumado okazos parte per reprezentantoj de la kolektiva instanco, parte per tiuj de la dungistaro. Tiuj entreprenoj vendos siajn produktaĵojn laŭ prezoj, kiujn oni povos kalkuli laŭ la kvanto da labortempo necesa por produkti tiujn varojn plus la prezoj de la krudmaterialo, plus parto de la eluzita valoro de la ilaro, maŝinaro, energio. Por la dungitoj oni kalkulos je nacia skalo kiom necesas por vivtenigi en bona stato ĉiun plenkreskulon. Ĉiu rajtas ricevi tiun Minimuman Garantiatan Enspezon (MGE), plus almenaŭ 10%. Laŭ mi, estus bone, ke plu estu iom da diferenco laŭ la profesia aŭ respondeca posteno, sed ne

tro granda kiel nun. Ekzemple de 10% ĝis 100% super la M.G.E. por la plej kvalifikitaj kaj diligentaj profesiaj kategorioj. Ankaŭ, ke la respondeculoj ricevu kromsalajron por siaj profesiaj kromelspezoj. Post subtraho de ĉiuj tiuj entreprenaj elspezoj kaj diversaj kontribuoj, la profito fariĝos socia propraĵo anstataŭ kapitalista propraĵo.

Post propono de la teknikistoj, decidos la politika povo (popolaj reprezentantoj) pri uzado de tiu kapitalo. Mi vidas socialismon laŭ tiu maniero. Ne temas pri kompleta kaj egaleca disdonado de la produktaĵaro, sed pri disdonado al ĉiuj de sufiĉa, eĉ komforta parto por kontentigo de la bezonoj, kun iom da suplemento al aktivuloj, iniciatemuloj, elpensantoj. Alia parto estos dediĉita por prizorgi kaj renovigi la ekipaĵaron tiel produktan kiel socialan. Estos ŝparita la cetero, kiu fariĝos socia kapitalo. Poste oni uzos tiun socian kapitalon por realigi grandajn projektojn. Ĉu oni produktos per malpli da laboristoj, tiel lasante multajn senlaborulojn? Laŭ mi, estus preferinde, se ĉiu devus labori dum malpli da tempo, ankaŭ se oni uzus disponeblajn laboristojn por, ekzemple, daŭrigi profesiojn, kiuj bezonas lertajn, spertajn laboristojn por persistigi la konojn kaj sciojn; ankaŭ por bonigi, beligi la vivmediojn, por zorgi pri la naturo, la kamparo, la forsto.

Por doni ĝustan kaj justan solvon al tiu problemo, ŝajnas bone, sumigi la bezonaĵojn de la kolektivo (ekz. nacia kaj antaŭvidi per kiom da labortempo oni povas ilin kontentigi (laŭ la sciencaj, teknikaj konoj kaj laborprocedoj en la donita tempo). Antaŭvidi, koncepti, kiuj taskoj estas necesaj por progresigi sciencon, teknikon, instruadon, por pli sana, agrabla vivmedio, naturo, por la artoj, distroj, administrado, ĉiuj necesaj taskoj aŭ servoj. La sumon de la aktivkapabluloj bezonataj por tiuj taskoj oni subtrahos el la nombro da aktivkapabluloj disponeblaj. Restos la nombro disponebla por la produkta laboro necesa. Oni povos determini kiom ĉiu devus labori por efektivigi ĉiujn necesajn taskojn.

Eble ĉiuj tiuj kalkuloj estos nefacilaj kaj por kiel eble plej ĝuste starigi regularon oni bezonos bazi ĝin sur ekzistantaj faktoj.

(daŭrigota)





# laŭtaj informoj kaj petoj

La enigmo de p.26 : La desegnaĵo aperigas <u>du</u> virinojn : unu, pli okul-frapa, estas nebela kun pinta mentono, dum la alia estas multe pli ĉarma, ĉu ne ?








## LA "LUDOJ NOVAJ"

Danke al la internacia lingvo, la esp-istoj disponas je ilo jam mirinda por bone komuniki inter si reciproke. Sed, ĉar homoj estas homoj, ekzistas ankoraŭ aliaj komunikiloj ol la lingva, ekzemple, la korpaj, la gestaj, la artaj kiel la muziko, la pentrado, la dancado, la skulptado ktp...

Ĉu ne okazas, ke eĉ inter esperantistoj povas ekesti komunikaj malfacilaĵoj en la ĉiutagaj interrilatoj? Kompreneble jes, ĉar homoj estas homoj! Iu el ĝiaj kaŭzoj povas esti la nesufiĉe bona kaj vera kono de la aliulo.

Ĉu ekzistas rimedo ebliganta per tre agrabla metodo al la esp-istoj ekmalkovri la aliulojn pli bone, en etoso de totala reciproka respekto, ne nepre uzante la ilon lingvan?

Fakte! Ĝi ekzistas kaj nomiĝas : **"LUDOJ NOVAJ".**

"Ludoj"? Via cerbo certe jam tuj vigle reagis pensante, ke tio devas esti afero malserioza, konsekvence tute ne interesa! Taŭga nur por infanoj!

Nu, se ludo estas vere sinonimo de rido, ĝi tamen ne nepre implicas malprofundecon, kontraŭe! Ĝi posedas valoron propran, precipe kiam temas pri tiu ĉi speco de ludoj, kiuj profundigas kaj stimulas la kreivan pensadon de la ludanto.

Ĉe la **"LUDOJ NOVAJ"**, ne estas la plej forta, la plej inteligenta, la plej sperta la gajnanto, kaj ĉiuj aliaj la perdantoj! Ne, ĉi tie <u>ĉiu estas gajnanto</u>, pro la pozitiva malkovro de si mem kaj de aliuloj.


Tra ludoj simplaj (se tute ne malinteresaj!), inter kaskadoj de ridetoj kaj ridoj, ĉiu amuziĝas en etoso sekura kaj de kunlaboro. Fakte, ĉar kunludi proksimigas la partoprenantojn iun al la alia, komuneca sento kreskas aŭtomate... Kaj ĉu tio ne estas precipe gravega punkto por la esp-istoj?

Tiu remalkovro de propra kreiva energio povas esti utila por solvi personajn kaj samtempe profesiajn problemojn.

Ludo kaj rido ambaŭ ebligas personan transformiĝon, helpas al resanigo kaj al bona evoluo sur la vojiro de la vivo.

- Ĉiu, senescepte, rajtas partumi tiujn "Novajn Ludojn" sen konsideroj pri aĝo, fakultoj, kompetento...
- Ie ajn oni povas ilin ludi.
- Neniun specialan materialon oni bezonas, pro la fakto, ke la bazelemento de la ludoj estas la ludantoj mem.
- La minimuma nombro de la grupo estas 5, la maksimuma estas 50.

Ludgvidantino : Gilen TILLEUX-CRAENHALS
Les Hauts de Meuse, 4
B-5101 ERPENT (Namur)   Tel 081-30 29 20



## SPEZOJ DE A.E.R.A.

| | |
|---|---|
| Vendoj - Kotizoj | 4517,00 |
| Aĉetoj | - 2022,00 |
| Jara saldo | 2495,00 |
| Antaŭa saldo | + 3407,87 |
| Nun en la kaso | 5902,87 |

Ni registris por Amika E-Rondo Aĝenia sume 105 membrojn, kotizintajn (36) aŭ donacintajn (69), al kiuj aldoniĝas ĉ. 50, kiujn ni konsideras membroj, ĉar ili helpas per abona monprovizado (A aŭ B).
Ni aparte kontentas pro la ampleksega biblioteko (konsultebla surloke) kaj la kolekto da kasedoj, kiu, kvankam konsistanta parte el kopioj, povas interesi la novulojn.

### Aparta spezaro por la ekipado de la Muelejo :

En 1990 la donacoj por la ekipado de nia renkontiĝejo sumas : 9865,50. Ni elspezis 437. por la asekuro asocia. Antaŭe estis 4969,05. Nun estas disponebla jena sumo : 14397,55 FF por (re)pagi materialon por la restadejo (tendoj, faldeblaj litoj, ktp...). Jen la listo de la donacoj. La donacintoj sin rekonu per siaj inicialoj kaj ricevu plej koran dankon pro sia kontribuo :
T.P. 100, anonima 100, F.G. 300, C.L. 200, S.A. 57,50, G.C. 400, J.D. 1000 R.G. 200, N.M. 200, J.S. 156, S.A. 202, N.M. 200, P.C. 170, A.W. 40, anonima 50, H.C. 50, R.S. 50, J.M. 50, J.C. 140, A.R. 70, O.F. 760.
+ E.B. 1000 DM.

### Letereto el nia muelejo

Kiam aperis la novembra letero (L!90, antaŭlasta paĝo), fluis ne multe da akvo en Seŭno kaj amiko Stanko gipsadis entuziasme... Sed jen li devis subite forlasi Francion pro viza afero. Li tamen havis sufiĉe da tempo por lasi subskribe sur teretaĝa muro belegan gipsan ŝildon ESPERANTO por la miro kaj admiro de la venontaj generacioj. Dankon, Stanko, kaj ĝis!
Amiko Gastono orientis sian ĉarumon al oriento t.e. al la akvobaraĵo kaj al la ne plu uzata alvenkanalo. Tie nun konturiĝas la estonta orienta tendum-tereno, ĉe la natura banejo de la rivertruo, pli ombrata kaj pitoreska ol la okcidenta. Ankaŭ ĉi tie Gastono remodlas, ŝovelas, segas... dum mi sendornigas kaj motorsegas.
Ha, mi ne forgesu : jam instalita estas la centra hejtado. Mankas nur gas-provizo por ĝin pompe inaŭguri! Ĝis baldaŭ kaj bondezirojn al ĉiuj!

**Kristiano**






## BILANCO de 1990

### Eldonado :

En 1990 estis eldonitaj pluraj novaj broŝuroj : RE, TC, AT, FP, LEK*.
RE, dank'al mendo de la Liberecana Frakcio de SAT, TC por la Mondcivitanoj, AT en la kadro de la Liberpensula Frakcio.
FP utilas por franclingvaj E-lernantoj.
*LEK = **"La eta kato kiu ne volis morti"** estas fakte represaĵo de porinfana broŝureto kies unuan eldonon presis ICEM (E-Fako de Moderna Lernejo "Freinet") antaŭ pluraj jardekoj. Tiam tradukis nia jam aktiva amiko Lentaigne.
Estis reeldonitaj : SA, CM, MM, LN, KV, FF, LA kaj, laste sed ne malplej grave :
**"Tra la mondo per biciklo kaj esperanto"** de L.A. Péraire.
Mi dubas, ĉu eblus fari pli, sen dungi duan eldon-frenezulon!
Kompreneble, tiuj eldonaĵoj aŭ reeldonaĵoj ne estas elvenditaj kaj aldoniĝis al la jam montaspekta stoko.
Tamen, la **kas-bilanco** refariĝis pozitiva. La presilo estas nun tute pagita kaj estas en la kaso eĉ iom da mono provize por la estonteco.
Sed mi konscias, ke pro la samtempaj ĉiuspecaj laboroj por loĝebligi la muelejon, mi ne povos plu, sen rekta helpo surloka, daŭrigi la eldonadon tiel lavange, des pli ke ne kreskis la interesiĝo por la broŝura serio : ne progresis la nombro da broŝurabonantoj (B).

### Kas-bilanco :

| | | | |
|---|---|---|---|
| Vendoj - Provizoj : | 44873,74 | Eldonado | 24464,00 |
| Donacoj | 3654,50 | Afranko | 3264,00 |
| Sume : | + 48528,24 | Diversaĵoj + Transĝiroj | 9910,69 |
| | | Sume : | - 37638,69 |

La ĉi-jara saldo estas : + 10889,55
La antaŭa estis : - 2546,04
Estas do nun en la kaso : 8343,51

**Kristiano**

---

* Bonvolu konsulti la broŝurliston por deĉifri la mendkodojn! Dankon!

---

**La venonta numero de Laŭte! aperos meze de marto.**
Ĝi enhavos i.a. la debaton "Pri ŝanĝoj en la lingvo", daŭrigon de "Disdona ekonomio", inviton al diskuto pri Esperanto kaj Ekologio (W. Gunther) kaj... la kutimajn rubrikojn.

# BILANCO de 1990

**Abonantaro :** 457 !
En 1989 estis 421, do kresko je 8%, kiu fontas preskaŭ nur el novaj legantoj ekster Francio. Nia revueto estas nun legata 45-procente de nefrancoj, kio estas plia paŝeto al ĝia internaciiĝo. Notindas, ke la malavaro de Laŭtuloj ebligis sendi **Laŭte!** al 55 personoj en nefavorataj landoj (orienta Eŭropo, Afriko...).

**Enhavo :**
En la 308 paĝoj de 1990 ni favoris ĉefe la originalajn tekstojn, memorigante ke **Laŭte!** principe aperigas kiel eble malplej da tradukoj.
Krom la debatoj iniciatitaj per ĉenleteroj, viglis la diskutadoj pri la lingvo mem, pri nacieco/naciismo, kredo/nekredo. Iuj legantoj esprimis sian preferon por pli koncizaj artikoloj kaj ne tro longaj polemikoj. Ni aparte bonvenigus desegnojn, anekdotojn, pli literaturecajn artikolojn, originalan poezion... sed kompreneble pri la enhavo decidas la abonantoj mem per siaj sendaĵoj!

**Spez-bilanco :**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Abonoj + donacoj | 22288,20 | Jara saldo | 8737,70 |
| Eldonkostoj | 10155,00 | Antaŭa saldo | 8027,91 |
| Afranko | 3395,50 | Nova saldo en kaso | 16765,61 |

Ĉar aperis nur 5 numeroj (4 dikaj, 1 "normala"), ni ŝparis monon kaj refirmigis la kason. La ĉi-jaran abonprezon 60-frankan, kvankam ne tre altan, ni intencas apliki ankaŭ en 1992, kaj pristudi eventualan modifon nur por 1993 kaj nur se tiam necesos.

**Eldon-laboro :**
Dankon al tiuj kontribuantoj, kiuj povas sendi al **Laŭte!** jam prespretajn, "enpaĝigitajn" tekstojn! Tio ŝparigas ŝviton kaj dorsdoloron al la kaduka redaktanto/tajpanto/presanto/broŝuranto/ekspedanto/kasisto. Dank'al Aŭgusto la Dua (presilo Rex-Rotary 1040, reklamo ne senpaga!) la presado estas facila, sed la broŝurado (faldado, malfaldado, kolekado, gluado, tranĉado...) de 500 dikaj ekzempleroj estas longega, aparte teda puntasko. Agrafado (anstataŭ gluado) estus pli simpla tekniko, sed ne taŭgas por dikaj kajeroj... Ni eĉ ne menciu la ekspedadon (preparado de banderoloj, ilia gluado, afrankado por eksterlando...). Ni do petas ĉies indulgemon, se foje estas eraretoj...

**Kristiano**

---

**Se tie ĉi estas kruco, tio signifas, ke ni ankoraŭ NE ricevis vian reabonon.**
**Dankon pro la "ordigo" !**

Gérant & imprimeur : Baudé, F47470 Beauville. CPPAP 58651